

1977 oktobro

70-a jaro

n-ro 862 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Nova lerneja jaro alportas
novajn milojn da Esperanto-lernantoj

Vi trovos

— kondiĉe ke vi iom pripensos la aferon —, ke la "nova jaro" en la Esperanto-movado fakte komenciĝas iam fine de aŭgusto aŭ komence de septembro. Do, tuj post tiuj karnavalaj kongresaj semajnoj inter la mezo de majo (fervojistoj) kaj la mezo de aŭgusto (ĉi-jare TEJO, IKUE k.a.). Nur tiam oni povas iom normale spiri kaj eklabori laŭ freŝaj agadplanoj, kiujn oni kutime akceptas ĝuste en la kongresoj. Pro tiu ĝenerala movada normaligo kaj aldone — pro la fakto, ke ni produktantoj de la revuo ne plu devas pozi al la ĉiutagaj feriaj vizitantoj de la Centra Oficejo —, pro tio ankaŭ ĉi tiu numero fine aspektas preskaŭ normale. Iom da nekutimeco donas al ĝi svarmeto da premiitaj verkoj en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj. Sed, tamen, oni ja vidu kiaj verkoj gajnas la premiojn. Tio onin povus kuraĝigi venontjare mem konkursi. Sukceson, se...!

Enhavo

- 161 Unesko kaj UEA: De konsultado al kunlaboro
- 162 Trankvile pri Rejkjaviko: Post la norda ekspedicio (sm)
- 163 Dudek kvin jaroj de la libromarko "Stafeto": Animoj-libroj, homoj-mondoj (Juan Régulo Pérez)
- 164 Prunteprenita temo: Alarmo el Londono
- 165 Mesaĝo de prezidanto Carter: Pli ol afablaĵo, 50a Kongreso de SAT: Organize bona
- 166 Komuna kongreso de mondanistoj kaj mondfederistoj: Sojlo de apliko, Belartaj Konkursoj 1977: Postrikoltaj pensoj (Baldur Ragnarsson)
- 167 Belartaj Konkursoj 1977, Originala poezio, Dua premio: La ĝardeno (Kazimierz Szczurek)
- 168 Informoj de CED: Kiel statas EdE? (Ulrich Lins), Antaŭkongreso en Skotlando: Kulturo kaj turismo
- 169 Belartaj Konkursoj 1977, Originala prozo, Unua premio: La lasta misio (Bernard Golden)
- 170 Belartaj Konkursoj 1977, Originala poezio, Dua premio: Mezdecembra promeno (Jiří Kořínek)
- 172 Recenzoj ("Espéranto et Interlingua", Libro pri Eroŝenko, "Primico", "Forkaptita", "La vojo")
- 173 Belartaj Konkursoj 1977, Originala poezio, Tria premio: Lazur' kristala kaj pluv' susura (Masayuki Kuroda)
- 174 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 175 TEJO-paĝo: TEJO-Komitato en Poitiers: Ĉefe pri Statuto (Stefan MacGill), "Varbumo"
- 176 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 178 Nekrologoj (N. Booth, S. Ĉaklec, E. Daskalov, C. Estable, H. Lundin, T. Ujlaky-Nagy, H. Wehrheim), Oficiala informilo n-ro 509: Varbkampanjo kun premioj
- 179 Kotiztabelo de UEA por la jaro 1978
- 180 Ekzameno E (Bernard Golden)

La kovrilo

"EKSTARO" nomiĝas ĉi tiu foto de Stefan MacGill, kiu per ĝi gajnis la duan premion en la fotografia branĉo de la Belartaj Konkursoj 1977. "Ekstaro" okazis kaj estis kaptita per foto-objektivo en la Unua Internacia Lernejo de ILEI, en Belgio, fine de majo ĉi-jare (v. nian juli-aŭgustan n-ron, p.135). Ekstaroj okazas dum ĉi tiuj tagoj en multaj lernejoj tra la mondo, kie novaj miloj da lernantoj eklernas ankaŭ la Internacian Lingvon. Foje devos ekstarti ankaŭ la Movado por deĉe akcepti la ekstarantajn novulojn kaj flegi ilian pluan interenson pri Esperanto, precipe pro la fakto, ke ili lernas ĝin libervole.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,00 gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińsk, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

De konsultado al kunlaboro

DUDEK TRI JAROJN post Montevideo, kie en 1954 prof. Lapenna sukcesis elbatali la akcepton de la jam fama rezolucio de Unesko favore al la Internacia Lingvo, la konsultaj rilatoj de UEA kun la monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo spertas ne nur simplan revigliĝon, sed veran renaskiĝon, tutan renesancon. Tiu konata formulo – "(en konsultaj rilatoj kun Unesko)" – komencas liberiĝi de siaj krampoj kaj transiri el la leterkapoj en la agadprogramojn, ĉi-foje ne sole de UEA, sed ankaŭ en tiujn de Unesko. Tian konkludon trudas la agado pri kiu nia revuo jam plurfoje skribis dum la lastaj jaroj kaj al kiu estas dediĉitaj apartaj sekcioj ekz. en la lastatempaj Estraraj Raportoj. Ĉi-sube ni mencias nur kelkajn el la lastatempaj atingoj, kiuj pruvas, ke efektive ne plu temas nur pri konsultaj rilatoj.



Ŝanĝiĝas la kvalito de niaj rilatoj kun Unesko: S-ro Emmanuel Chicot (maldekstre), kiu jam tri jarojn reprezentas UEA ĉe Unesko, apud la Ĝenerala Direktoro en Islando.

Post la unua mesaĝo, kiun en la menciitaj 23 jaroj sendis al UEA – al la 60a UK en Kopenhago en 1975 – la plej altranga funkciulo de Unesko, sekvis la pasintjara mesaĝo de s-ro Amadou-Mahtar M'Bow al la Kongreso en Ateno. Tiu mesaĝo enhavis gravan frazon ĝuste pri la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA: "Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plue plifortiĝos en la venontaj jaroj." La sekvanta paŝo estis la alveno de la

Ĝenerala Direktoro de Unesko al la 62a UK en Rejkjaviko, pri kio ni amplekse raportis en nia septembra numero. Tamen, pro la amplekso de la grava parolado, kiun s-ro M'Bow faris al la kongresanoj en Rejkjaviko, pluraj aliaj trajtoj de tiu historie grava vizito ne ricevis la merititan atenton en nia revuo. Tial ni revenas al ili ĉi tie.

Temas, ekzemple, pri la foto-ekspozicio "Tridek jaroj de Unesko", kiun en la ĉeesto de la Prezidanto de Islando malfermis s-ro M'Bow. Tie per plurdeko da fotoj kaj klarigoj en Esperanto kaj la islanda lingvo bildiĝis la laboro de Unesko. La ekspozicio nun cirkulas en la islandaj lernejoj. Estus pli ol utile, ke ĝi poste komencu cirkuli ankaŭ tra la Esperanto-movado kaj, pere de ĝi, tra aliaj lernejoj tutmonde. La ekspozicio mem estas elokventa pruvo pri unika kunlaboro, kiu en la antaŭ- kaj dum-kongresa periodoj kreiĝis inter la Islanda Unesko-Komisiono unuflanke, kaj Islanda Esperanto-Asocio kaj UEA aliflanke. Kvankam iniciatita de UEA, tiu ekspozicio malfacile povus okazi sen ekzempla kunlaborpreteco, kiun montris s-ro Andri Ísaksson, sekretario de la Komisiono, preta doni helpman manon ankaŭ en pluraj aliaj kongresaj laboroj kaj aranĝoj.

Iom antaŭ la Kongreso en Rejkjaviko komenciĝis du aliaj gravaj projektoj de kunlaboro inter Unesko kaj UEA. Ĉi-foje temas pri eldonaj entreprenoj. Laŭ kontrakto, kiun komence de aŭgusto subskribis la du organizaĵoj, antaŭ la fino de novembro ĉi-jare, en Esperanto aperos broŝuro kun jena – iom longa – titolo: *Rekomendo pri edukado cele al internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado pri la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj*. Ĝi aperos en 15 000 ekzempleroj, sub la nomo de Unesko, kiu disponigis 2 000 guldenojn por kovri la preskoston, dum UEA prizorgas la tradukon kaj distribuon. Niaj legantoj senpage ricevos la broŝuron kun unu el la postaj numeroj de la revuo. Krome, en la fina trakto-stadio troviĝas ankaŭ alia eldonaĵo de Unesko en la Internacia Lingvo. Ĝi estos la baza informilo pri Unesko, kies reviziita nacilingva eldono estas atendata, por poste pretigi ĝian Esperantan version. Jam ekzistas interkonsento pri la financaj kaj aliaj aspektoj de la projekto.

Aliflanke, sekve de la parolado de la Ĝenerala Direktoro de Unesko en Rejkjaviko, kiun Unesko mem jam distribuis en presita nacilingva versio, UEA pretigas tri dokumentojn, kiuj iros, interalie, al ĉiuj ricevintoj de la parolado de s-ro M'Bow. Temas pri: baza dokumento pri Esperanto kaj UEA, raporto pri la 62a UK (kaj la kongresoj ĝenerale) kaj aparta dokumento pri

la lastkongresa ĉeftemo "La rajto je komunikado". Ĉiuj ĉi dokumentoj aperos dum la sekvantaj monatoj kaj signos komenciĝon de grava informkampanjo direktita al ĉiuj naciaj reprezentantoj ĉe Unesko, ĉiuj landaj Unesko-komisionoj, neregistaraj organizaĵoj ktp. Por finance subteni tiun agadon, la prezidanto de UEA bonvenigis en la ferma solenaĵo de la 62a UK monkontribuojn. La unua rezulto de tiu alvoko plian fojon montras, ke la esperantista sindonemo kaj preteco helpi apenaŭ havas limojn: Jam tie en Rejkjaviko kolektiĝis pli ol 3 000 guldenoj (v. la liston de la donacintoj sur la paĝo 179 de ĉi tiu numero). Tiuj donacoj — kaj la aliaj, kiuj intertempe venis al la Centra Oficejo, kaj ankoraŭ certe venos — estas klara signo pri la ĝenerala movada subteno de la nova evoluo en la rilatoj inter Unesko kaj UEA. Tiuj rilatoj ne plu estas nur konsultaj, ili jam fariĝis kunlaboraj kaj fariĝas ĉiam pli kaj pli intimaj, je la profito de ambaŭ organizaĵoj.

TRANKVILE PRI REJKJAVIKO:

Post la norda ekspedicio


UNU EL LA PLEJ GRANDAJ valoroj de la Universala Kongresoj estas la fakto, ke la kongresa ŝtormo, vortico, uragano — nomu ĝin laŭplaĉe — malkovras nekonatajn aktivulojn kaj elstarigas iliajn kvalitojn. Kongresoj ja malkaŝas ankaŭ "kalkanojn de Aĥilo", malfortaĵojn de la kongreslanda Movado, sed pri ili ĉi-foje ne temas. Ĉiu Universala Kongreso, precipe tiuj en novaj kongreslandoj, similas ekspedicion, veran esplorvojaĝon por malkovri nekonatajn movadajn potenciaĵojn. Kiu, ekzemple, povus nei, ke la pasintjaraj UK kaj TEJO-kongreso malkovris la novan prezidanton de la junulara sekcio de UEA (v. la paĝon 175)? Sed, ni vidu kion malkovris nia ĉi-jara norda ekspedicio al Islando!?

Apude: Hallgrímur Sæmundsson, modela LKK-sekretario de la 62a UK.

Dekstre: La urbestro (maldekstre sur la foto) de Akureyri akceptis partoprenantojn de la Postkongreso.

Verdire, almenaŭ dum la lastaj du jardekoj, ĉiuj movadaj mencioj de Islando ligiĝis al la nomo de poeto Baldur Ragnarsson. La Movado ĝis nun ne trovis tempon por dece aprezi la geniecon de alia islanda elstarulo — Thórbergur Thórdarson, kiu antaŭ tri jaroj mortis preskaŭ forgesita de la Movado, kvankam seriozaj studoj povus montri, ke Thórbergur estis la plej granda nacilingva verkisto, kiu ne simple subtenis Esperanton, sed uzis ĝin kaj el ĝi faris gravan komponanton de du trionoj de sia vivo. Thórbergur jam en 1933 aperigis sian kelkcentpaĝan studon *Internacia lingvo kaj lingvaĉoj*, sian "Esperanto en perspektivo". Sed ni revenu al Baldur! Ni ja sciis, ke tie en la nordo vivas la aŭtoro de eble plej modernaj kaj pensigaj versoj en la nuntempa Esperanta beletra. Ni konis liajn poeziajn kvalitojn, sed estis surprizo malkovri liajn organizajn talentojn, kio siavice helpas kompreni la organizitecon de liaj versoj. Ni malkovris ankaŭ Hallgrímur Sæmundsson, unu el tiuj denaske modestaj laboregantoj, kiuj senĉese kaŝas sin en la kernon de la aferoj. Rikolto estis ankaŭ remalkovroj de tiuj lingvaj erudiciuloj Árni Bödvarsson kaj Baldvin B. Skaftfell, de tiu iama animo de la atentinda beletra revuo *Voĉo de Islando* — Ólafur S. Magnússon. Sen la Kongreso en Rejkjaviko ni eble tute ne konatiĝus ankaŭ kun: Ingimundur, alia Ólafur, Louisa, Gerda, Thorey, Stefan, Vidar, Bjarni, Ragnar, Jón Hafsteinn kaj deko da aliaj, kies nomojn ni ne sukcesis lerni, sed kies helpemon ni abunde ĝuis. Ni esperu, ke ekz. TEJO sukcesos memori, ke en Islando restas iom da freŝaj, aktivegeblaj fortoj. Ni esperu ankaŭ, ke nia venontjara ekspedicio al la oriento de Eŭropo pruvos, ke en Bulgario ekzistas ankaŭ aliaj internaciformataj aktivuloj, krom tiu eterna kaj jes ja valora Aleksiev.

sm



Fina malstreĉiĝo post longa kaj sukcesa laborado: Islandaj LKKanoj (kun la Estraro de UEA) sur la podio en Rejkjaviko.

Animoj-libroj, homoj-mondoj

Por celebri la 25an jubileon de la libromarko "Stafeto", eldonisto Torben Kehlet aranĝis en Rejkjaviko – la 1-an de aŭgusto 1977 – akcepton por plurdeko da Esperantaj verkistoj kaj aliaj aktivuloj sur la kultura kampo de la Esperanto-movado. Ni ne trovis pli belan manieron mem marki tiun jubileon, ol ĉi tie aperigi la elstaran paroladon, kiun la eldonisto de la "Stafeto"-libroj faris dum la akcepto.

POR MI, la ĉeftemo de la kulturosciencoj, de la homosciencoj, estas la lingvo. Al mi ŝajnas, ke la lingvo, en si, kiel produkto de la spirita evoluo de la homo, estas pli grava, pli transcenda, ol ĉiuj realigaĵoj, kiujn oni faras per ĝi, se kiel lingvorealigaĵojn ni ekzemple konsideras *Biblion*, *Donkiĥoton* aŭ poemon de Kaloĉajo. Mi estas konvinkita, ke la lingvo, kiel kultura fenomeno – nome, kiel aperas, kiel estiĝas tiuj aproboj kaj konsentoj, kiujn ni ne konscias kaj kiuj tamen determinas, ke vi kaj mi interkompreniĝas –, mi estas konvinkita, ke tiu fenomeno ampleksas kaj superas ĉiajn doktrinajn kaj sistemajn realismojn. Mi opinias, ke la lingvo estas la plej grava kultura kreaĵo, kiun la popolo faras kiel popolo.

En tia kompreno, mi simple transigis al la kampo de la esperantista **popolo** – kaj sekve al la kampo de la **lingvo** Esperanto – la samajn kriteriojn kaj celindaĵojn, kiujn la lingvistiko kaj la filologio aplikas al gentaj lingvoj. Ĉar Esperanto, jes ja, estas, kvalite, tiel genta aŭ landa lingvo kiel la novhebrea en Israelo, papiamento en Kuracao, svahilo en mezorienta Afriko, la hindia en Hinda Unio ktp., kaj malpli artefarita ol ekzemple la estona. Por mi, do, Esperanto **jam** venkis, kiel unika, memstara, tutplaneda kultura fenomeno!

Kiam mi tenas en miaj manoj STAFETO-libron, neeviteble mi sentas, ke, per ĝi, fariĝas, en mi, karna vero reala, ne spektra vero racia, la plej penetra testamento belliteratura de la hispana verkisto Miguel de Unamuno. Li ĝin skribis, kiam li estis ekzilita pro rezisto kontraŭ la unua hispana diktaturo, dum la dudekaj jaroj de nia jarcento, kaj lin akompanis nur liaj libroj. Jen fragmento de tiu belliteratura deklaro, laŭ mia plata Esperanto:

*Kun mi, vin mi portas, fratojn,
Por loĝigi mian dezerton.
Kiam vi pensos min morta,
Mi tremos en viaj manoj.
Jen miaj animoj-libroj,
Homoj-mondoj tute veraj.
Kiam vi ĝisfunde vibros,
En vi mi vibros, legantoj.*

Pri libroj-testamentoj mi parolas. Persone estas al mi interese povi morti kun preta konscienco. En la certeco, ke mi agis sincere, honeste, solidare. Se oni povus

al mi doni elekteblon inter la destino de poeto, kies versojn oni ripetos post kvin jarcentoj, kaj la destino de civitano, kiu helpis siajn najbarojn vivi pli bone, mi elektus, eĉ se tion oni ne kredus, la duan aspiron. Eble tial mi neniam eldonis propran libron en Esperanto, kvankam du originaloj ŝimas, prespretaj en unu el miaj tirkestoj, jam de ĉirkaŭ dekkvino da jaroj. Mi, ĉiam, elektis kunhelpi samideanan najbaron, al li aŭ al ŝi donante la vicon. En Homaranujo, do, por la posteularo, mi estos nomo, kiu aperas nur sur la bibliografiaj slipoj de kelkaj librejoj, al kies bretoj mia eldonista,



Prof. Juan Régulo Pérez (dekstre), kun ges-roj Bormann, dum la akcepto en Rejkjaviko, kie d-ro Werner Bormann parolis en la nomo de la Estraro de UEA.

gutenbergara faraĵo kunlaboris alporti lingve sennaciecajn inkunablojn ... Eĉ se tio ja ne estis mia origina instigilo, pli altan repagon mi apenaŭ povas imagi!

Esti homo ja mi celis. Sed kio estas homi, esti homo? Ekde la plej malnovaj kaj respektindaj formoj de la saĝeco, ĝis la plej ĵusaj kaj eltrovemaj esprimoj de la sofistiko, tuta lavango da difinoj filozofiaj kaj poetikaj sin proponas responde. Aldone, jen mia kompreno de la afero. Esti homo, vera homo, tio estas paŝi sur la tero, paŝi preta por diri, en kiu ajn momento: "Tio mi estas, kaj por tio mi vivas". Librofaristo mi estis. Tion mi elektis, por esti mi mem. Por tio mi vivis. Sekve, en

tiu konkreta fideleco mi volas havi la centron de mia vivo — trans miaj eblaj malkonstantecoj kaj trans miaj eblaj elglitiĝoj —; havi la centron de mia vivo, mi ripet-
tas, kiam la morto proksimiĝos kaj flustros al mi la etan vorton, kiun ĝi kutimas: "Iru! "

Pro etika alvokiĝo, tute sen profita ambicio, mi estis — kaj volas pluesti — eldonisto de Esperantujo. Por tio mi vivis dum la pasintaj dudek kvin jaroj. Je konstanta memdono por la pliriĉigo de nia literaturo, mi konsumis tiujn dudek kvin ŝlosilajn jarojn de mia vivo. Sed ja ne ekskluzive: antaŭe kaj dum tiuj jaroj aliajn aferojn mi celis. Kelkajn mi atingis: mi nome estas edzo, mi estas patro, mi estas amiko, mi estas edukisto.

Kiam mi tenis en miaj manoj animon-libron — animon, kiu fariĝadis presita papero —, multfoje mi vibris — kaj ripete mi plue vibras — je kontakto kun homomondo, kun iu, en kies persona realo fariĝis vivo kaj vorto, vorto kaj vivo, la tero sur kiu ŝi aŭ li ekzistis. Por la nuna jaro, koincide kun la dudekkvinjara aktivado de la libromarko STAFETO, mi planis aperigi titolliston de miaj eldonoj. La presprovaĵojn mi ja pretigis; sed, ĉar, pro okazaĵoj transe de mia solveblo, mia eldonagado en La Laguna senvigliĝis dum la du lastaj jaroj, tiu librokatalogo restis nur presprovaĵo. Sed, eĉ tiel, ĝi dokumentas, ke ĝuste ĝis 1977 mi, pli-

malpli, kunpretigis naŭdek librounuojn. Hazarde, tiom da libroj, kiom da ekzistojaroj kalkulas nia lingvo!

Mia deziro, mia arda deziro, nun, kiam miaj eldonfortoj ekcedas, estas, ke tiu ĉi mia agado sukcesos koncertigi tiujn inter vi, kiuj senrezerve amas nian librokulturon. Kiam mi pensas pri la atendanta kaj necesbezonanta multeco de la libroamantaj esperantistoj, ŝajnas al mi, ke tion peti, ne estas tro postuli. La unua jam elpaŝis. Jen: amiko Torben Kehlet, ekde nun, kunhelpas pluporti la torĉon. Al li profundan dankon. Ĉar, jes ja:

Mi eldonis librojn-fratojn

Por elvoki koncert-agojn.

Venkito dum la hispana interfrata milito de la tridekaj jaroj, dum kvardek unu jaroj ekzilito en mia propra lando, **dank' al Esperanto** el ĉiuj partoj de la tero venis homoj-mondoj, animoj-libroj por loĝigi mian dezerton. Kun ili mi klopodis kunlabori, kunloĝi, kunkreski, kiel eble plej sindevontige. Kelkfoje mi, supozeble, sukcesis; kelkfoje, certe, ne. Sed, kiel ajn, dank' al vi, samideanaj proksimuloj, dum tiuj lastaj dudek kvin jaroj, mia biografio ne estis homarana vakejo, mia vivo ne estis solidare malplena...

Al ĉiuj, profundan, tutkoran dankon.

Juan Régulo Pérez

PRUNTEPRENITA TEMO:

Alarmo el Londono

THE GUARDIAN, prestiĝa londona ĵurnalo (eldonkvanto 335 570), en sia n-ro de la 12a de septembro ĉi-jare aperigis interesan kaj nekutime klarvortan artikolon sub la titolo "Ne ĉesu disvastigi kulturon".

Jes ja, en la artikolo de Nicholas Bannister temas pri la britaj lingvo kaj kulturo, temas almenaŭ unuavide, titole. Sed la enhavo de tiu senvuala teksto pli ol pravigas la fakton, ke la artikolo kun prikultura titolo aperis en la financa suplemento de la ĵurnalo. Temas esence pri financoj, pri pundoj, kaj ne unuavice pri la disvastigo de la brita kulturo.

Laŭ s-ro Bannister, la ĉefaj eldonejoj de Britio estas tre malkvietaj pro lastatempa propono redukti la eksterlandan rolon de Brita Konsilio (British Council). La eldonistoj opinias, ke tiu propono, preparita de ia registara "cerbo-trusto" (angle: Think Tank), "grave subtaksis la komercajn avantaĝojn, kiuj fontas el la sukceso de Brita Konsilio kuraĝigi la uzon de la angla lingvo en eksterlando." La eldonistoj atentigas — en raporto, kiun nun ili pretigas por la registaro —, ke libroj konsistigas unu procenton de la tuta brita eksporto. Ni aldonu, ke ekz. en 1975 tiu unu procento devis sumiĝi al preskaŭ 200 milionoj da pundoj! Tio tamen estas nur la unua el la fortaj argumentoj de la eldonistoj. Multe pli grava estas la opinio, ke tranĉoj en la agado de Brita Konsilio "en longa perspektivo

kreus malpli favoran klimaton por britaj eksportistoj — ni aldonu — ĝenerale. Ĉar, daŭrigas *The Guardian*: "Multaj homoj, kiam ili studas fremdan lingvon, vizitas aŭ loĝas dum ioma tempo en la koncerna lando. Tio ofte kreas gravajn ligojn inter la homo kaj la koncerna lando." Jes ja, temas pri gravaj ligoj, sed ili malofte restas nur kulturaj kaj facile transformiĝas en komercajn ligojn, mezureblajn per pundoj.

La artikolo klarigas al la legantoj de *The Guardian*, ke Brita Konsilio estas "kvazaŭ registara organizaĵo, financata el propraj komercaj enspezoj kaj subvencioj de la ministerioj por eksteraj aferoj kaj eksterlanda evoluigo". Enestas, krome, atentigo, ke "la aliaj industriaj landoj agnoskas la komercajn avantaĝojn de la vasta scio de iliaj lingvoj kaj kulturoj", kaj ke landoj, kiel ekz. Francio kaj FR Germanio, "fakte pligrandigas la rimedojn je la dispono de siaj ekvivalentoj de Brita Konsilio".

Nu, nenio nova por ni esperantistoj en la alarma artikolo de *The Guardian*. Tiuj faktoj estas al ni en la Esperanto-movado bone konataj kaj ni jam delonge kaj prave etikedas ilin per la nomo "lingva imperiismo". Nova tamen estas la fakto, ke *The Guardian* skribas pri ili kaj faras plurajn publikajn konfesojn pri la ne-lingvaj kaj ne-kulturaj aspektoj de la klopodoj konservi la hegemoniajn poziciojn de la angla lingvo en la mondo. Kuraĝa kaj nova estas ankaŭ la fakto, ke tiu "kultura" artikolo trovis sian ĝustan lokon en la financa suplemento de la londona ĵurnalo. Fine oni komencas doni al la aferoj ĝustajn lokojn kaj nomi ilin per la ĝustaj nomoj.

sm

Pli ol afablaĵo

"MI SENDAS plej varmajn salutojn al la delegitoj en ĉi tiu 25a Jara Konferenco de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.

Plibonigita komunikado inter individuoj kaj nacioj estas unu el la ĉefaj metodoj por konstrui pli grandan internacian interkomprenon kaj bonvolon.

Mi laŭdas viajn klopodojn kontribui al tiu celo kaj dezi-
ras al vi tre fruktodonan kaj sukcesplenan kunvenon."

Tiu mesaĝo, subskribita de la usona prezidento Jimmy Carter venis la 22an de julio ĉi-jare al la 25a Kongreso de ELNA, okazinta fine de julio en la Universitato de Georgetown en la usona ĉefurbo Vaŝingtono. Eĉ se la mesaĝo estus nur pura afablaĵo, necesas diri, ke estas unuafoje, ke prezidento de Usono turnas sin rekte al esperantista organizaĵo aŭ kunveno. La fakto, ke la mesaĝo venas nur kelkajn monatojn post alia deklaro de la usona prezidento, kiu parolis pri la graveco de individua komunikado kaj lernado de fremdaj lingvoj (v. nian n-ron de julio/aŭgusto ĉi-jare, p. 138), klare montras, ke prezidento Carter trovas tempon interesiĝi pri la problemoj, kiuj okupas la Esperanto-movadon, kaj ne volas kaŝi siajn simpatiojn por la laboro de esperantistoj.

Cetere, la 25a Kongreso de ELNA distingiĝis ankaŭ per alia trajto, nekutima por la movadaj aranĝoj: ĝi



Prezidanto Carter: Valoro de rektaj individuaj kontaktoj.

estis maksimume malfermita ankaŭ por neesperantistoj, ĉar ĝia programo enhavis plurajn publikajn, nacilingvajn aranĝojn. Rezulto de tia orientiĝo estis ampleksaj favoraj raportoj en la gazetaro kaj aliaj amaskomunikiloj.

50a KONGRESO DE SAT:

Organize bona

SENNACIECA Asocio Tutmonda (SAT) okazigis sian jubilean 50an Kongreson en Augsburg, FR Germanio, inter la 30a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Elstara impresio estis la glata organiza funkciado, atingita de la



Bonaj lokaj kontaktoj: Prof. Fischer, urbestro (maldekstre) kaj s-ro H. Schmid, ĉeforganizanto de la Kongreso.

lokaj aktivuloj, kiuj jam aranĝis plurajn kongresojn, kaj pro tio flegas bonan rilaton kun la urbaj instancoj. Tio ebligis inaŭguri la SAT-kongreson en la urbodomo, en la ĉeesto de la urbestro, kiu salutis la kongreson. Kiel kutime, ankaŭ UEA sendis salutanton. Tiun taskon ĉi-foje plenumis juna nov-zelandano Stefan MacGill, vicprezidanto de TEJO, laboranta en la CO de UEA. La 251 partoprenantoj el 18 landoj havis okazon aŭskulti kvin prelegojn, interalie: "Malevoluo en evolulandoj" de prof. P. Neergaard (Danlando) kaj "Memore pri 50 Kongresoj de SAT" de N. Bartelmes (Francio).

Ne mankis al la kongresanoj ekskurseblecoj: la ĉefa estis tuttaga inter la bavariaj alpoj ĝis la urbeto Mittenwald. Partoprenantoj en duontaga ekskurso spertis belan surprizon: la loka Esperanto-grupo en Pfaffenhofen aranĝis festvesperon, kun folkloraj dancoj, ĉefe de infanoj, kaj salutparolo de prof. Maier, agrikulturministro de Bavario.

Tri laborsesioj rezultigis ampleksan gvidrezolucion, dum la elstara kultura ero estis la teatra prezento *La Justuloj* de A. Camus, kiu pro sia etika-socia temo aparte impresis la spektantojn. Tiu prezento, kiun faris la pariza trupo TESP, allogis ankaŭ televidfilmistojn.

Sojlo de apliko

EN LA UNIVERSITATO de Parizo, de la 1-a ĝis la 10a de julio, okazis la 17a Monda Konferenco de la Monda Asocio de Mondfederistoj, kune kun la 2a Mondanista Asembleo. Estis entute ĉ. 400 partoprenantoj.

La komunaj aranĝoj de la du organizaĵoj komenciĝis en 1975 en San-Francisko, kie la mondanistoj decidis, ke Esperanto povas esti laborlingvo aldone al la angla, franca kaj japana. En 1967 la 12a Monda Konferenco de la mondfederistoj, kies laborlingvoj estas ankaŭ la angla, franca kaj japana, malakceptis proponon pri Esperanto. Tiuj apartaj tendencoj de la du organizaĵoj pri Esperanto ankoraŭ nun restas. Sed en la praktiko la du organizaĵoj — el financa vidpunkto — kune utiligas la samtempan tradukadon por siaj komunaj kunvenoj. Tial teorie estas eble en tiuj kunvenoj apliki la sistemon de la samtempa tradukado ankaŭ por Esperanto. Por rajte funkciigi la tradukservon, necesas la ĉeesto de almenaŭ 40 Esperanto-parolantoj, kies gepatra lingvo estas nek la angla, nek la franca, nek la japana.

Malgraŭ la alvokoj en la Esperanta gazetaro, venis al la komuna kongreso nur kelkdeko da Esperanto-parolantoj inkluzive de deko da japanaj mondfederistoj, kiuj ankoraŭ ne bone parolas Esperanton. Rezulte ne okazis la samtempa traduko en Esperanto.

UEA estis reprezentita pere de la tiama estrarano E.J. Woessink. En la inaŭguroj de la du paralelaj aranĝoj, li salutis en Esperanto kaj akcentis, ke la monda unuiĝo aŭ federigo povos realiĝi nur, se estos uzata iu komuna lingvo, neŭtrala al ĉiuj popoloj. Lian saluton oni tradukis en la francan, kaj el la franca en la anglan kaj japanan.

En la kadro de la eduka komisiono de la mondanistoj, 13 Esperanto-parolantoj faris proponon rilate al la utilo de Esperanto por mondanisma edukado. La proponon alprenis la komisiono kaj metis ĝin en sian raporton, kiu estis prezentita ĉe la ferma kunsido de la Mondanista Asembleo, kiun ĉeestis ankaŭ mondfederistoj.

Estos utile, se Esperanto-parolantoj laŭeble ĉeestos tiajn kongresojn kaj, se konvene, atentigos pri la solvo de la lingva problemo. Tiurilate imitinda estas la agado de francaj esperantistoj, kiuj distribuis kelkajn specojn de informiloj pri Esperanto al milo da homoj, kiuj venis al la amasa kunsido, malfermita al parizanoj, por aŭskulti la prelegojn de 16 eminentaj mondanistoj kaj mondfederistoj, inter kiuj troviĝis du Nobel-premiitoj.

AWN

BELARTAJ KONKURSOJ 1977:

Postrikoltaj pensoj

La prezidanto de la Komisiono pri la Belartaj Konkursoj ankaŭ ĉi-jare amplekse komentis la rikoltan de BK en Rejkjaviko. Ni aperigas lian raporton, kiun ni plurloke koncizigis.

KIEL SCIATE, la Komitato de UEA akceptis novan regularon de la Belartaj Konkursoj, destinitan kaj por plifaciligi la juĝkomisionan proceduron kaj por formale konstati evoluon okazintan ĉe la Konkursoj dum la pasintaj jaroj. La nepre plej grava ŝanĝo estas la oficiala forfaligo de la tradukaj branĉoj, pro la malfacileco efike juĝi ilin, kun espero, ke la anoj de la diversaj naciaj lingvoj organizos proprajn tradukajn konkursojn sub aŭspicio de UEA. Iuj esprimis siatempem fortajn dubojn pri tiu ŝanĝo, emfazante la gravecon de tradukoj en kaj por la historio kaj evoluo de Esperanto kaj ĝia literaturo. Kompreneble tiu vidpunkto estas absolute prava. Tion ja klare konstatis la Estraro de UEA, kiel eksplicite skribis frue ĉi-jare ĝia estrarano pri kulturo, d-ro H. Tonkin, en letero al la prezidantoj aŭ delegitoj pri kulturo de ĉiuj landaj

asocioj, kie li sugestis al la landaj asocioj "priekzameni la eblecojn aranĝi literaturajn konkursojn ĝuste kaj ekskluzive por tradukita beletro kaj por la respektiva nacia lingvo." Mi tial estas feliĉa povi jam nun informi pri tio, ke Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko kaj la Londona Klubo jam efektivigis tian iniciaton por la angla lingvo kaj ke ankaŭ konkurso "Larius", Italio, enkondukis tradukan branĉon, kaj ke ambaŭ tiuj petis kaj ricevis aŭspicion de UEA. Laŭ peto de la prizorgantoj de la Anglalingva Traduka Konkurso la rezultoj de tiu konkurso estos anoncitaj en tiu ĉi kunveno de la Belartaj Konkursoj de UEA. Mi konsideras ĉi tion kiel gravan paŝon sur la vojo al plia kultura kunlaboro inter landaj asocioj kaj UEA kaj aparte bonvenigas tiun eventon.

Ke io paralela estas ja atendebla en baldaŭa estonteco, pri tio mi ankaŭ havas tre bonajn esperojn; alvenis fine de junio letero de Unuiĝo Franca por Esperanto, kiu atestas ekiron laŭ la sama direkto; propono de regularo por Francalingva Traduka Konkurso estas jam prezentita al pluraj landaj asocioj, sur kies teritorio estas parolata la franca lingvo, kun la peto ke ili partoprenu en kunorganizado de tiaj konkursoj, sub eventuala aŭspicio de UEA. Do, estas jam klare, ke ĝuste la koncerna rearanĝo pri la tradukaj branĉoj prezentas novajn eblecojn por reenergiigo de la traduka arto; ni esperu, ke pliaj lingvaj teritorioj sekvos la ekzemplon de la angla kaj la franca laŭeble baldaŭ. Por la Belartaj Konkursoj 1977 envenis entute 56 konkursaĵoj krom 13 eroj por la Fotokonkurso. Tio

ne estas alta nombro, sed ni ne forgesu tion, ke temas nur pri originalaj verkaĵoj. Iasence oni povas aldoni al tio la nombron de tradukaĵoj ensenditaj por Konkurso "Larius" kaj la Anglalingva Traduka Konkurso kiu laŭ mia scio entute proksimiĝas al cent, sed mankas al mi precizaj informoj. Tiuj menciitaj 56 originalaj konkursaĵoj dividiĝas ĉi tiel, laŭ branĉoj: prozo 16, poezio 32, teatraĵo 6, kaj eseo 2.

Kompare kun la lasta jaro konsiderinda malpliigo de prozaj konkursaĵoj estas bedaŭrinde konstatebla (lastjare ili estis 26), poemoj plinombriĝis je 5 eroj, la nombro de teatraĵoj duobligis, sed ĉe la nova branĉo, **eseo**, al kiu mi persone ligis kaj ja ankoraŭ ligas grandan esperon, ĉi-jare la partopreno estis tiel magra, ke laŭ la rekomendo de la sekretario de la Konkurso, Alec Venture, oni ne aljuĝas la premion Minnaja ĉi-jare.

Pri la **prozo** la juĝintoj havis iom diferencajn opiniojn. La plej severa el ili koncize esprimis sian opinion tiel, ke "la nivelo ege malaltiĝis kompare kun la antaŭa jaro," sed tiam ja envenis kelkaj konkursaĵoj vere bonkvalitaj. La sama juĝinto plendis pri "mankoj de elementa scio de la Esperanta gramatiko" ĉe pluraj konkursaĵoj, eĉ en tiuj kazoj, "kiam la elektita temo ne estas malbona." Li do proponis ne aljuĝi la unuan premion ĉi-jare. La ceteraj juĝintoj ne esprimis similan opinion, tiel ke estis decidite tamen aljuĝi unuan premion.

La **poezio** ĉi-jare ankoraŭ trovas sin apenaŭ mez-deklive ĉe tiu fama valo, pri kies mita ekzisto kritikemuloj neniam laciĝas memorigi nin — aŭ ĉu ili menciadas ĝin nur pro propra laciĝo? La afero ja ne estas tre simpla: la granda islanda verkisto kaj esperant-

isto Thórbergur Thórdarson, pri kiu vipovas iom legi en la Kongresa Libro, diras iuloke: "Ĉiuj libroj estas bonaj. Kaj ĉiuj libroj estas malbonaj. Neniu tuta libro estas bona, kaj neniu tuta libro estas malbona. Ĉiuj libroj estas kaj bonaj kaj malbonaj aŭ malbonaj kaj bonaj." Supozeble io simila estas direbla pri poemoj: poemo povas esti grandparte bona kaj etparte misa, aŭ ĝi povas esti etparte bonega kaj grandparte mizera, ktp.

Kiel mi jam menciis, la partopreno en la **teatraĵa** aŭ drama branĉo duobligis kompare kun la lasta jaro. Tio tamen neniom estas impona fakto, se konsideri la aktualan nombron de konkursaĵoj, kiu estas 6. Pri la kvalito nemulto estas dirinda. Konstatablas la kutima manko de surscenejiga ebleco, kiu sendube influas la tekstan prezentmanieron; por dramo unua premio ne estis aljuĝita ĉi-jare, kio fakte ne estas io nova.

Laste, inter la literaturaj branĉoj, sekvas la lastjare lanĉita nova branĉo **eseo**. Tiam estis rimarkinda la alta kvalito de ĉiuj 5 konkursaĵoj. La du ĉi-jaraj konkursaĵoj ambaŭ ricevis kelkan laŭdon de la juĝintoj, sed tamen estis pli da kritikaj komentoj, aŭ por citi unu prijuĝon: "nek unu nek la alia atingas tian stilan majstrecon, kia estas unu el la allogaĵoj de la esea arto." Koncerne premiadon por eseo, mi volis memorigi pri tio, ke tiu branĉo estis lastjare iniciatita de la familio Minnaja, kaj ke nur unu premio estas aljuĝita. Laŭ propono de la sekretario de la Konkursoj, bazita sur la kritikaj prijuĝoj, ni decidis ne aljuĝi premion ĉi-jare. Mi persone tre bedaŭras ĉi tiun fakton, kaj samtempe uzas la okazon por esprimi mian esperon pri pli multnombra kaj rezultodona rikolto por 1978.

Baldur Ragnarsson

BELARTAJ KONKURSOJ 1977

Originala poezio

Dua premio (en egaleco):

La ĝardeno

En nia ĝardeno
mankis
tonditaj spaliroj buksaj,
statuoj de diinoj ne blankis,
ĉirkaŭ baseno
luksa
nek ludis kobold' per fluto.
Kompense — abundis floroj ĉirkaŭ la domo,
kaj la aromoj
dum vesperar' somera
l' varman aeron narkote saturis.
Odortributon
sendis rozaro diversspeca,
siring', lilioj, dianoj, latiro
kaj matiol' dukorna

kiu — kontraste al rozo dorna —
ie ajn kaŭris por parfumi vesperojn,
en pretervid' sekuris,
soleca,
plaĉa nur pro sia spiro.
Alia buntular' diversa,
jen digna, jen eĉ pompa, jen modesta,
klopodis same fajni,
ŝajni
ne malpli grava,
loge rava,
kaj, kvankam sen aromo,
tentis ne malpli ol l' edena pomo.
Ĝardeno simpla, buked' milnuanca!
Al via sin'
izola
venadis mi tokson de l' tagoj elspiri,
emon por novaj agoj reakiri.
Sola
aŭ en sentalianco
kun la ĝardenistin'.

Kazimierz Szczurek
(Pollando)

Kiel statas EdE?

PASIS jam pli ol kvar jardekoj, de kiam en Budapeŝto, ĉe Literatura Mondo, aperis la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto* (EdE). Hodiaŭ kredeble la plimulto de la esperantistoj eĉ neniam vidis tiun brilan rezulton de kunagado de la plej konataj spertuloj, kiujn la Movado siatempe sciis mobilizi. Delonge oni sentis la bezonon havi duan eldonon de EdE. Efektive, antaŭ preskaŭ dek jaroj komenciĝis la preparlaboroj por nova eldono, kies aŭspiciojn transprenis CED. La eldonisto J. Régulo metis la novan EdE en la eldonan programon de sia STAFETO.

Ni iom rigardu al la celo de tia Enciklopedio. La iniciatinto de EdE, Ivan Ŝirjaev, celis (en 1930) forigi la mankon "de informlibro, kie Esperantistoj, precipe kursgvidantoj kaj kursanoj, povus senpene kaj rapide trovi koncizajn kaj ĝustajn sciigojn, necesajn al ili pro kio ajn rilatanta al la Esperanto-movado..." La redaktoroj de EdE (aperinta en 1933/34), L. Kökény, V. Bleier kaj K. Kalocsay, plilarĝigis tiun celdifinon, nomante la verkon "ne nur simpla manlibro por elementaj bezonoj, sed verko taŭga ankaŭ por pli altaj pretendoj de propagandistoj, literaturistoj, lingvistik-emuloj". Jam pro la vortumo oni komprenas, ke tiu celdifino povas resti valida hodiaŭ nur parte. Estas du ĉefaj konsideroj, kiuj devos nin gvidi dum la preparado de nova eldono de EdE, nome:

- La lingvo, la movado, la tuta Esperanta kulturo multe evoluis dum la pasintaj jardekoj. Tial ne eblas simple aktualigi la unuan eldonon, kvazaŭ aldoni suplementon por la jaroj de post 1933/34; tio interalie troŝveligus la amplekson de la verko. Tra la jaroj ankaŭ severiĝis la kriterioj por distingi inter gravaĵoj kaj ne-gravaĵoj rilatantaj al Esperanto. Do, necesos komplete rekonsideri la tutan evoluon de Esperanto ekde 1887.
- EdE devos ankaŭ utili al la ekstera, scienca publiko. Dum la lastaj jaroj Esperanto pli kaj pli transformiĝis en seriozan studobjekton; tiun pliintensigantan sci-volon de eksteruloj la nova eldono devos klopodi kontentigi.

La ĉefaj interesiĝantoj pri EdE kompreneble restos la esperantistoj. Sed ili nun havas pli altajn postulojn en rilato al Enciklopedio. Tio faciligos la sukcesan realiĝon de la redakta celo: kaj liveri al esperantistoj la plej ĝisdatan konsultilon, kaj disponigi al esplorantoj altkvalitan gvidilon tra la movado kaj literaturo de Esperanto. Tio signifas ekzemple, ke EdE ja entenos vastan aron da temoj, sed, traktante ilin, limigos sin al la plej esencaj faktoj kaj sciindaĵoj. Tiun rigoran koncizecon tamen kompensas la detalaj bibliografiaj informoj, kiuj ebligas al la konsultinto, se li deziras, pli fundan studon de la temo.

La — konsentite, iom ambicia — projekto de nova Enciklopedio ne estas rapide realigebla. La laboro certe daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn. (Intertempe restas havebla *Esperanto en perspektivo*.) Multo dependas de la kunlaborantoj, do de homaj fortoj kaj malfortoj. Bedaŭrinde s-ro Reinhard Haupenthal, kiu en 1968 transprenis la redakton de la artikoloj pri lingvo kaj literaturo, ial deklaris en printempo 1974 sian laboron finita; de tiu tempo li ne plu informis la ĉefredaktoron pri eventuale ricevataj manuskriptoj — ankaŭ ne, post kiam en somero 1975 li komencis nei sian eksigon. Ĉar ne estis eble atingi reakordiĝon, la ĉefredaktoro estas devigita deklari, ke li distancigas sin de ĉiuj agoj kaj pretendoj de s-ro Haupenthal en rilato kun la Enciklopedio.

La nuna redaktoro pri literaturo estas s-ro Vilmos Benczik, bone konata inter la legantoj de tiu ĉi revuo pro sia funda scio kaj sobra juĝkapablo pri nia literaturo. Sendube estas bonaŭgura signo, ke ankaŭ en la nova eldono de EdE kunrolas budapeŝtano. Kun kandidatoj por la ofico de redaktoro pri lingvo nun okazas traktado. La artikolojn pri movado prizorgas la ĉefredaktoro, kiu kunordigas la tutan laboron kaj traktos pri la eldono de la verko.

Kelkaj el la artikoloj jam verkitaj aperis kaj plue aperos de tempo al tempo en diversaj Esperantaj revuoj. Krome, estas preparata nun definitiva listo de la artikoloj, kiuj eniros la duan eldonon. Tiun liston ni povos disponigi al ĉiu, kiu esprimas la emon kunlabori, por ke li juĝu, kiujn el la ĝis nun neverkitaj artikoloj li deziras transpreni.

Ulrich Lins
Ĉefredaktoro de EdE

ANTAŬKONGRESO EN SKOTLANDO:

Kulturo kaj turismo

EN LA UNIVERSITATO de Stirlingo — de la 26a ĝis la 29a de julio — kunvenis pli ol sepdek homoj por la Oficiala Antaŭkongreso, kultura kaj turisma duon-semajno, kiu — sub la aŭspicio de UEA — okazis laŭ invito de skotaj esperantistoj. Estis trankvilanima ekvilibro inter la feria kaj la intelekta aspektoj de la programo, ĉar la ekskursanoj veturis tra la montoj kaj lagoj de la bela Skotlando, dum la aliaj elektis ĉeesti prelegojn kaj seminariojn sub gvido de Marjorie Boulton, Albert Goodheir kaj William Auld, kiuj ĉefe pritraktis facetojn de la skota kulturo. Kun la anoj de la internacia kongreso de KELI (en Edinburgo, inter la 23a kaj 30a de julio) oni kune en Edinburgo ĉeestis koncerton, kies eroj estis altkvalitaj. Verŝajne pro la prizorgo de la organizantoj, kiuj atentis ĉion kaj ĉiun, kaj pro la influo de la bela universitata lokalo kaj milda klimato, regis etoso de bonhumora diligento. Pro tio meritas dankon ankaŭ la neesperantistoj, kiuj helpis regale prezenti siajn tradiciojn de kanto, muziko kaj danco.

V.R.

La lasta misio

**Bernard Golden, usonano el Hungario:
En la lastaj du jaroj — kvar premioj en
la Belartaj Konkursoj de UEA.**



SILENTO REGIS en la ĉambrego de la Tribunallo pri Militaj Aferoj de la 20-a Regiono, kiam la juĝisto verdiktis, ke Hans Schneider, 24-jaraĝulo el Nancy estas mortkondamnita pro spionado. Kiam la juna lorenano aŭdis la juĝdecidon, lia reago ne estis tiu de ŝoko sed de kolero.

”Kial,” li demandis kun plenda tono, ”oni mortigos min? Tiu akuzito, kiu okupis la ĉelon apud la mia estis kaptita nur post sia kvara misio kaj li ricevis kondamnon al porviva punlaboro. Mi eĉ ne plenumis la duan mision! Kie estas la justeco?”, li kriis, arogante kraĉante tiujn vortojn en la vizaĝon de la juĝisto.

La advokato ŝarĝita de la defendo de la spiono penis mildigi la verdikton, elvokante en sia pledado la malfeliĉan vivhistorion de la kulpulo. Li celis konvinki la Tribunalon, ke lia kliento ne estas vastsperta arki-krimulo, sed psikologie malstabila junulo, kies fiagadon oni povas karakterizi kiel diletantan spionadon de flavbeka novico. La ĉefa vivproblemo, kiu konstante prezentigis al Hans Schneider, alinome Jean Schneider kaj John Taylor, estis lia necerta nacia identigo: ĉu germana, ĉu franca, ĉu usona? Kun konfuzita fremd-iginta personeco, li sentis sin ĉiam kiel loĝanto de nenieslando.

Schneider naskiĝis en 1921 en malgranda vilaĝo apud Metz en Loreno. Antaŭ la unua mondmilito, kiam tiu regiono estis sub germana regado, la patro servis en la armeo de Kaiser. Tuj kiam eksplodis la milito, li dizertis kaj forkuris al franca teritorio. Post la milito li edzinigis kamparaninon, kiu same kiel li estis german-devena. La filo Hans naskiĝis en farmbieno, kiu apartenis al la familio de la edzino. Hejme ĉiuj parolis germane; en la lernejo la deviga lingvo estis la franca. Pro la malfacila ekonomia situacio de la familio en la 30-aj jaroj, s-ro Schneider decidis elmigri al Ameriko kaj kun la helpo de parencoj tie, li dungigis en ŝtalfabriko en Pittsburgh. Lia dekkelkjara filo rapide adaptiĝis al la nova vivo kaj ellernis ankoraŭ unu lingvon.

”Paĉjo” Schneider, entuziasmiĝinte pri la nova lando, volis kaŝi sian eksterlandan devenon, do li laŭleĝe ŝanĝis la familian nomon je Taylor per la simpla procedo de traduko.

La familio daŭre prosperis en la nova ĉirkaŭmedio ĝis 1938, kiam tragedio detruis ĉiujn esperojn. Okaze de aŭtomobil-akcidento, la gepatroj de Hans mortis. La usonaj parencoj, ne dezirante surprizi la respondecon pri la ĵus orfigita 17-jara knabo, resendis lin al familianoj en la lorena vilaĝo. Tie li restis kun siaj geonkloj, helpante ilin en la farmbieno, ĝis la nigraj nuboj de la dua mondmilito denove mallumigis la horizonton de la junulo.

Ne longe post la germana invado de Francujo, la maljunaj geonkloj mortis kaj Hans, aŭ Jean, sola devis okupiĝi pri la farmbieno. Li pasive observis la eventojn de la unuaj jaroj de la milito, sed fine decidis fuĝi for de la enuiga sencela vivo en la kamparo. Li iris al Metz kaj aliĝis al la milicio. La situacio en tiu regiono ŝanĝiĝis, kiam la unuaj usonaj taĉmentoj alteriĝis en Normandio en 1944. Tiam venis al li eĉ pli alloga ebleco kontentigi sian soifon je aventuro. Unu el la rekrutistoj de la spionad-reto Kondor proponis al li tre lukran laboron de ”kolektanto de informoj”. Hans fariĝis varbito sen tro da persvado.

Kun ducent kelk aliaj sampatrujanoj li estis sendita por trejnado al spionad-lernejo starigita en la Nigra Arbaro en la sudokcidenta parto de Germanujo. Tie Schneider tuj altiris al si la atenton de la stabanoj, kiuj rimarkis, ke li rapide kaj lerte alproprigis la rudimentojn de la nova metio. Lia perfekta scio de tri lingvoj eĉ pli valorigis lin kaj baldaŭ oni rigardis lin preta fari sian unuan mision.

Majoro Vogel klarigis al Schneider, ke la organizaĵo bezonas identigajn dokumentojn de usonaj soldatoj por estontece enfiltri en la malamikajn trupunuojn spionojn, kiuj pozos kiel usonaj militkaptitoj sukcese forkurintaj el germanaj malliberejoj. La germanoj pro-

vizis Hans per uniformo de usona oficiro kaj kondukis lin malantaŭ la usonajn liniojn. Li rapide orientiĝis kaj atingis urbeton, kie troviĝis la ĉefa kvartiro. Promenante tien kaj reen surstrate, li konfiskis la dokumentojn de soldatoj, kiuj neglektis saluti lin laŭ la preskribita armea etiketo. Post kelkhora agado li rikoltis dekon da identigiloj.

Por la sukcesa plenumo de sia unua tasko Schneider ricevis, krom sia monata salajro de 8000 frankoj, monpremion de 10 000 frankoj. Li jam konstatis, ke la nova okupo alportas aventurojn kaj riskojn, sed la fakto, ke ĉio estas aranĝita kontraŭpage, igis lin bagateli la verajn danĝerojn. Cetere, la liaopinio brila sukceso de la unua misio, kiu estis tutsimple aŭdaca ruzaĵo, inspiris al li eksceson da memfido.

Schneider nun estis enskribita en "postdiplomano" kurson por prepari sin al plua agado. Lia restado en la Nigra Arbaro jam forigis lian vivenuon ne nur dumtage, kiam li estis okupita en la trejnejo por spionoj, sed ankaŭ liberhore. En la apudeco troviĝis armea sanatorio destinita al vunditaj oficiroj. Plurfoje, dum promenadoj en la najbara vilaĝo, Schneider vidis la flegistinojn, kiuj venis al la vilaĝo fari komisionojn. Fine, li kuraĝis alparoli iun beletan sveltan blondulinon kaj li surpriziĝis, kiam ŝi respondis per afabla rideto. Ekde

la unua renkontiĝo la du junuloj simpatiis unu kun la alia.

Hans eksciis, ke ankaŭ Else estis francujano. Ŝi naskiĝis en Colmar en Alzaco kaj post sia arbiturientiĝo iris al Berlin por studi en la medicina fakultato de la universitato. Bedaŭrinde, ŝi neniam finis siajn kuracistajn studojn. Ŝia fianĉo, aviadisto en Luftwaffe, mortis dum la unuaj tagoj de la milito en 1939, kaj pro emociaj problemoj — ŝi preskaŭ perdis la emon vivi — ŝi devis forlasi la universitaton. Tamen, ŝi decidis resti en Germanujo kaj fariĝis flegistino. Hans reciproke rakontis sian vivhistorion, kaj la komuna soleco de la du eks-samlandanoj eĉ pli firmigis la emociajn ligojn, kiuj komencis fari ilin nedisigeblaj. Rapide forpasis la tagoj kaj ankaŭ la noktoj, kaj finfine, ili faris la kutiman promeson: "Kiam la milito finiĝos, ni ..."

La usona ofensivo, alruliĝante pli rapide ol la germanoj antaŭkalkulis, interrompis la partoprenon de Schneider en la supera kurso de la trejnejo. Ĉi-foje kolonelo Kraus mem, la ĉefo de la spionreto, persone instrukiis al Schneider pri la venonta misio. "Vi iros al la teritorio okupota de la usonaj trupoj kaj tie vi intermiksiĝos kun la soldatoj por akiri senperajn informojn pri iliaj nombroj kaj pozicioj, pri ilia armilaro kaj spirita stato. Tiujn sciigojn vi tuj transdonos al la tieaj agentoj de nia reto aŭ per radiomesaĝo rekte al ni."

Schneider ricevis unu el la identigaj dokumentoj, kiujn li mem kolektis dum sia unua misio, kaj uniformon de simpla soldato. La junulo preskaŭ ofendiĝis pro sia nova rango, sentante, ke post sia unuafoja ŝajnigo kiel oficiro, li estis malpromociita. "Almenaŭ ili estus povintaj doni al mi uniformon kun galonoj de sub-oficiro," li protestis. La provizeja serĝento subridis kaj certigis al Schneider, ke se li sukcese revenos post la misio, li ricevos la sopiratan ranginsignon sur la germana uniformo, kiun li nun surportas. Tio trankviligis Schneider, kaj li rapidis al la vilaĝo por la vespera rendevuo kun Else.

Kiam la junulino eksciis, ke li baldaŭ forveturos por nedifinita tempo, ŝi fariĝis histeria. "Kial? ... kial?" ŝi plorsingultis. "Ĉu oni volas la duan fojon forŝiri el mia koro la feliĉon?"

Schneider provis konsoli ŝin, memorigante ŝin pri sia lerteco dum la unua misio. "Nenio okazos al mi. Se la situacio fariĝos tro riska, mi ĉiam povos forĵeti la usonan soldatveston kaj prezenti min kiel francon. Kolonelo Kraus pensis pri ĉiuj eventualaĵoj kaj provizis al mi ne nur usonajn dokumentojn, sed ankaŭ tiujn de franca soldato."

Else kapsignis, sed estis evidente, ke ne plaĉis al ŝi lia troa memfido. "Hanĉjo, promesu al mi," ŝi petis kun larmantaj okuloj, "ke vi estos tre singarda. Parolu kun neni pri la afero, faru kion ili volas kaj tuj, kiam vi havos la eblon, forlasu tiun laboron. Ĉu vi ne komprenas, karulo, ke ĝi estas pli danĝera ol batalo ĉe la fronto?"

"Ne timu, Elinjo," li diris ĉirkaŭprenante ŝin. "Ĉie en la mondo troviĝas danĝeroj." Kaj kun fanfara tono,

BELARTAJ KONKURSOJ 1977

Originala poezio

Dua premio (en egaleco):

Mezdecembra promeno

Solpaŝas vir' laŭ pado gvida
sur la altaĵo blankvestita.
Tra frosta neĝ' li lante tretas
kaj pala suno trabriletas
tra neĝgraveda nubogrizo.
El vepro jen leviĝas nizo,
ektime fuĝas ok fazanoj,
la silentemaj pejzaĝanoj;
finpentri ĉarmon de l' fabelo
neĝeroj falas de ĉielo...
Decembromeza tag' blankveste
ĉirkaŭas homon iel feste,
fride aŭguras vintra graco
pri la Kristnaska granda paco.
Tra milde rava bosk-drapiro
revenas el solej' la viro
kun pens', ke monda belo faktus,
se homoj homojn home traktus.

Jiří Kořínek
(Ĉeĥoslovakio)



provante ludi la nenion-timantan heroon, li aldonis: "Tio estas la granda aventuro de la vivo — alfronti la morton kaj sukcese eviti ĝin! "

La reago de Else estis eĉ pli intensa emociiĝo. "Pensu pri mi!", ŝi plorpetegis. Male, en tiu momento Hans pensis pri la 100 000-franka premio, kiun kolonelo Kraus promesis al li post plenumo de la misio.

La paro bone eluzis tiujn lastajn horojn de sia kunesto. La sekvan tagon majoro Vogel ordonis al Schneider prepari sin foriri. "Hodiaŭ aviadilo liveros vin al nia frontlinio en Francujo. Dum la nokto vi estos paraŝut-igita malantaŭ la usonaj linioj en la apudeco de la urbo Epinal. Pli detalajn instrukciojn vi jam ricevis de kolonelo Kraus, ĉu ne? "

Schneider respondis jese kaj kunklakante la kalkan-umojn salutis: "Je via dispono, majoro."

Ĉe la tagiĝo Schneider staris en la mezo de tritik-agro kaj provis orienti sin en la ankoraŭ malluma ĉirkaŭaĵo. Iom post iom siluetiĝis kontraŭ la ruĝetiĝanta ĉielo la konstruaĵoj de la urbo. Trovinte kadukan grenejon apud la vojo, li fosis truon en unu el la internaj anguloj kaj enterigis la sakon kun siaj civilaj vestoj kaj la el-

sendaparato. Senpolviginte la novan uniformon, li ekmarŝis en la direkto al Epinal kaj post kvaronhoro atingis la centron.

Vidante nur francajn soldatojn surstrate, li iom konsterniĝis. "Infero kaj diablo! Kio okazis? Kie estas la usonanoj? Ĉu ili ankoraŭ ne alvenis? " Lia scivolo estis tiel granda, ke li volis paroli kun unu el la francoj, por demandi lin pri la situacio, sed li rezistis tiun tenton. "Ili certe suspektos min, ĉar mi flue parolas france."

Schneider apenaŭ ekpaŝis sur la urbplacon, kiam subite venis el unu el la flankstratoj veturilo rapidanta renkonte al li. Ĝi estis usona ĵipo portanta du soldat-policistojn. La ĵipo abrupte haltis antaŭ li, kaj la kondukisto vokis: "Hello, Johnny, we've been waiting for you."

Schneider estis tiel surprizita pro la neatendita bonveno, ke li balbute demandis anglalingve: "Ĉu vere? Kiel vi sciis, ke mi alvenis? "

La soldato sidanta apud la kondukisto ekstaris, elpistoligis sian armilon kaj celumante ĝin al la kapo de Schneider, boje ordonis: "Fermu vian faŭkon, Taylor, kaj eniru la ĵipon. Tuj! "

La grundo sub la ŝanceliĝantaj kruroj de la junulo kvazaŭ malaperis, kaj li konstatis, ke lia dua misio jam finiĝis.

...

En sia ĉelo, post la eldiro de la nenuligebla verdikto, Schneider denove serĉis la klarigon de la fiasko en sia memoro pri la eventoj de la ne tro fora pasinteco. La germanoj zorge planis ĉion tiel detale, tiel perfekte..., kial do malsukcesis la afero? Kie estis la usonaj trupoj? Kiel sciis la soldatoj en la ĵipo, kiu li estas? Ili eĉ vokis lin laŭ lia usona nomo! Ree kaj ree Schneider faris al si la samajn demandojn kaj ĉiam li trafis en senelirejan sakostaton. La respondo daŭre evitis lin, aŭ ĉu li subkonscie rifuzis kompreni la veron? Li intence forpuŝis el siaj lipoj la ŝlosilvorton: perfido! Iu perfidis lin. Sed kiu? Nur la oficiroj en la spion-trejnejo sciis pri la misio, kaj estas nekredeble, ke ili perfidis lin. Li riskis sian vivon por helpi ilin.

Laca, senespera, li provis pensi pri pli agrablaj aferoj, pri la lastaj horoj kun Elinjo. Ho ve! La sorto denove faris la kompatindulinon sola. Ĉu ŝi ankoraŭ atendas lin? Ĉu ŝi povas imagi, kio okazis al li, kie li estas nun? Ŝi ja promesis resti fidela al li...

Subite, kvazaŭ pro fulmofrapo, Schneider skuiĝis. Li ekkomprenis, ekvidis la blindigan lumon de la vero!

"Ŝi sciis, ankaŭ ŝi! Tiu hundino, ĉu ŝi informis la usonanojn pri mi? Ne, ne povas esti!", kriis la junulo, dum dolora grimaco distordis lian vizaĝon. Li ekstaris kaj komencis rabie bati sian kapon kontraŭ la dikan ŝtalpordon de la malluma ĉelo. "Sterkulino ... stinka putino! ", li hurlis. Kaj iom post iom eniris en la kontuzitan kaj sangantan kapon de la konvulsie ploranta trompito la plej fundamenta veraĵo de lia nova metio, tio, kion liaj instruistoj forgesis lernigi al li: fidu neniun!

Bernard Golden

Kompara studo

Recenzas W. A. Verloren van Themaat
(Nederlando):

Espéranto et Interlingua; Brève étude comparative, de E. Bernasconi. Trad. el Esperanto N. Piron. La Chaux-de-Fonds: KCE, 1976. 25p. 21cm.

En tiu broŝuro Bernasconi komparas Esperanton kaj Interlinguan, tiel el soci-historia, kiel el lingvistika vidpunktoj. Lia malpruvo de la soci-historia defendo de Interlingua estas trafa. Nur kelkaj detaleraroj: Occidental aperis en 1922, ne en 1921 (p.5). Iom supraĵa estas lia lingvistika defendo de Esperanto. Li ne mencias la tiel nomatan "spontanegan naturalismon" en Esperanto (la uzadon de internaciaj derivaĵoj, ne formitaj laŭ la reguloj de Esperanto, ekz. "redaktoro" anstataŭ "redaktisto"), konatan al ĉiuj esperantologoj kaj ofte uzatan de la naturalistoj kiel argumento kontraŭ Esperanto. En la bibliografio mankas *Planlingvaj problemoj* de Gilbert, la plej bona lingvistika defendo de Esperanto, precipe kontraŭ la naturalismaj planlingvoj. Uzebla reklamilo por Esperanto. Sed esperantisto, kiu ĉerpas siajn argumentojn nur el tiu broŝuro, estus facile senargumentigata en debato kun nur iom sperta Interlinguaisto. Mi esperas, ke en la aperonta studo de 170 paĝoj tiuj mankoj malaperos.

Prezo: 4,80 (por Nederlando 4,99) gld., plus sendokostoj 10%.

Libro pri Eroŝenko

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Zapaliv ja u serci vogonj.../Ekbruligis mi fajron en kor' (1973), de Nadija Gordijenko-Andrianova. Kievo: Veselka, 1977. 302p. Ilus. 14cm. Eldonkvanto: 50 000 ekz. **Prezo:** 0,55 rubloj. En la ukraina lingvo.

Jen aperis la dua eldono de libro pri unu el la plej mirindaj figuroj en la Esperanta kaj monda beletrio — Vasilij Eroŝenko. Ĝi estas verkita kompetente, kun profunda amo. La libro entenas rarajn, neniam antaŭe publikigitajn fotojn kaj faktojn.

Ĝi rakontas pri la vivo de la blinda homo, kiu vidis la mondon pli bone ol multaj vidantoj. Lia vivo estis tiom neordinara, ke ĝi ne estas kredebla, tamen ĝi estis vera.

Eroŝenko verkis precipe japane kaj Esperante. Kvanke li verkis ĉefe prozon, li estas konsiderata kiel poeto, ĉar lia prozo estas saturita de poezieco. Ne-

multaj liaj verkoj estis publikigitaj. La kruela sorto neniigis lian arkivegon.


Vivaj dialogoj, senfinaj detaloj faras la legadon interesokapta. La libro meritas esti eldonita ankaŭ en Esperanto kaj en naciaj lingvoj.

Ĉi-jare la moskva akademia eldonejo "Nauka" publikigos ankoraŭ unu libron pri Eroŝenko kaj lia verkaro en la rusa lingvo.

Riĉiĝo hinda

Recenzas William Auld (Skotlando):

Primico; Poemoj, de Robindronath Tagor (1861-1941). El la bengala trad. Probal Daŝgupto (1953-). Kopenhago: TK/Stafeto, 1977. Beletraj kajeroj n-ro 48. 114p. Ilus. 19cm. ISBN 87 87089 04 1.



Probal Daŝgupto:
Unuaranga kontribuo al nia kulturo.

Kaj nun ankaŭ la hinda kontinento alpaŝas kun sia gravega kontribuo al nia kulturo, per la unuaranga talento de Probal Daŝgupto. Ni riĉiĝas per kulturnocioj specife hindaj; ni proprigas al ni la **namon**, ni ekkonas la erotikajn eblecojn de la **anĉalo**. Alia najlo en la ĉerko de la "eŭropa" Esperanto.

Mi neniam antaŭe sukcesis trasenti la poezion de Tagor (per la anglaj versioj, kiujn li mem faris). Io mankis. Nun mi scias, ke tio estis ĝuste la **formo**, kiun Daŝgupto plene regas kaj redonas. Redonas per suka, flua, esprimiva Esperanto, kies subtilaĵojn li mirinde regas. Pli ol unufoje li sugestias belan nuancosolvon: *Ni estas tro malriĉaj, ol malfrui* (p.39), aŭ liveras al ni kolorriĉan adjektivon anstataŭ platan ĉiutagaĵon: *maljunul' aferanima, materireĝima*. Jen poeto aŭtentike potenca.

La poemoj de Tagor estas romantikaj, ĝenerale aludoriĉaj. Lia humoro estas jen ekstaza, jen nostalgia, jen akrete satira. Sed la elstara trajto de liaj versoj (se oni rajtas juĝi laŭ ĉi tiuj tradukoj) estas sonora belo. Mi renkontis jam plurajn legintojn de la libro, kiuj

entuziasme laŭdis ĝin; mi aliĝas al ilia nombro. Inter-tempe mi gratulas al Daŝgupto pri lia propra primico kaj avide atendas la pluajn rikoltojn.

Prezo: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld., plus sendokostoj 10%.

Sorĉa legallogo

Recenzas Clelia Conterno (Italio):

Forkaptita, de R.L. Stevenson (1850-1894). El la angla trad. A. Goodheir. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1976. 181p. 21cm. ISBN 0 905149 01 7.

Mi unuafoje legis la libron de Stevenson en la bona traduko de Goodheir ĝuste antaŭ mia forveturo al Skotlando survoje al Rejkjaviko. Historiaj faktoj miksiĝas en ĝi kun larĝlimaj horizontoj, kun senhomaj, iom misteraj pejzaĝoj, kun fremdaj al mi kutimoj kaj kostumoj kaj, eble, eĉ moralaj moroj: fremdaj laŭ tempo, laŭ lando, laŭ kulturo. Tamen, ne fremdaj entute: legante la aventurojn de la juna David kaj de lia plej aĝa amiko Alan Stewart en malamika regiono dum la interluktado de jakobistoj kaj hanovranoj, mi retrovis la naivan eksciton de mia knabina aĝo, kiam mi legis la romanojn de Walter Scott kaj de John Buchan, priskribantajn la samajn nebulplenajn pejzaĝojn de la Alta Lando, la samajn misterajn solecojn en la skotaj "glenoj" (= montaj valoj). Mi trovis en ĉi tiuj severaj landaspektoj sorĉan allogon al la legado, eĉ pli ol en la travivaĵoj de David kaj Alan, cetere ne ĉiam pravigeblaj aŭ akcepteblaj de realisma vidpunkto.

Tion ĉi mi estas skribanta survoje al Sterling, kaj des pli mi sopiras al renkontiĝo kun la lando de la solecaj altaĵoj kaj de la homvoĉaj sakŝalmoj; kaj ankaŭ al la persona konatiĝo kun la tradukinto, de kiu, ĉu mi rajtas peti malpli da neologismoj (*proprieto* anst. **bieno**, k.s.).

Prezo: 13,80 (por Nederlando 14,35) gld., plus sendokostoj 10%.

Kiam aperos pliaj?

Recenzas Paul Peeraerts (Belgio):

Vojo, La, de Gianfranco Molle k.a. Pizo: La Nuova Frontiera, 1977, Muzika kulturo 1. Kaseto stereofona, 45-minuta.

Jen kaj jen aperas disko aŭ kaseto en nia lingvo, kiun ni senhonte povus aŭdigi ankaŭ al neesperantistoj. *La Vojo* estas unu inter ili. Ĝi daŭras ĉ. 45 minutojn kaj konsistas el dekkvino da leĝeraj kantoj prezentitaj de Gianfranco Molle, juna itala talento. Sian varman voĉon li akompanas per bonega gitara kaj blovharmnika muziko.

La tekstoj estas modelaj. Iujn verkis majstraj aŭtoroj kiel Auld, Baghy, Boulton kaj Zamenhof; aliaj estas

tradukitaj plejparte de Renato Corsetti. Ili estas jen humuraj aŭ satiraj, jen seriozaj aŭ melankoliaj kaj plej ofte ne mankas la kritiko kontraŭ nia propra socio. Elstara estas la interpreto de "La Vojo" de L. Zamenhof, al kiu la kaseto ŝuldas sian titolon. Iom bedaŭrinda estas la plektiĝo de konstanta prononceraro: "ĉezu", "permezu", "etozo", "uzona" ktp. La teknika kvalito de la kaseto povus esti ankoraŭ pli bona. Kelkfoje la forteco de la muziko superas tiun de la voĉo, tiel ke la bele presita tekstlibreto (kiu cetere akompanas la kaseton) montriĝas necesa. La stereo-efektoj kelkfoje aspektas iom amatorecaj.

Tamen, tiuj manketoj ne malhelpu nin konkludi, ke ni ricevis bonegan kaseton, kiun espereble baldaŭ sekvos novaj produktoj de Gianfranco Molle kaj lia roma teamo.

Prezo: 17,40 (por Nederlando 20,53) gld., plus sendokostoj 10%.

BELARTAJ KONKURSOJ 1977

Originala poezio; Tria premio:

Lazur' kristala kaj pluv' susura

(sur aŭtuna Midoo-Avenuo)

Tankao


Aŭtun' fieras l' aeron plej kristalan, la sun' teneras, nubfloko super reklamtur' neĝblanke ŝvebas en lazur'.	Interne nigras fenestraj vitroj de l' granddom', orbrile dignas ginkarboj prilumate de l' stratlantern' de l' verdzon'.
Paseroj svarmaj gajbruas super trotuar' sur platanbranĉoj en hela vesperruĝo, rapidas hejmen homondar'.	Krepuskon tramplis elanhomflu' tumulte, verde kontemplas signal' nun vantajn pavimojn blokante l' aŭtojn stulte.
Homfluo pulsas finstacien impete, lavange stagnas ĉe la metroaj faŭkoj interpuŝiĝe strete.	* En pluv' aŭtuna pli frue falas noktvual', ofte ĉagrena ĉenstop' de l' aŭtoj ŝtopas transirejon ĉe l' verdsignal'.
Snoboj ascendas leĝere sur mezŝtonŝtupar', tra luk' lamentas lazur', eskalatoroj tri leviĝas kun homrempar'.	Pluvet' susura sur pavimojn surfalas, ŝose' polura reflektante l' neonlumon transirejon vitralas.
Solecon plendas lantern' hidrarga friske, arke arĝentas krescent' en krepuska blu', flavas ginkfolioj triste.	Masayuki Kuroda (Japanio)

Argentina novelaro. El la hispana trad. Elena Izarriaga kaj Enio Huga Garrote. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978 (fakte 1977). 43p. Mimeo. 21cm. Ses diversaŭtoraj noveloj. Prezo: 1,80 gld.

Ärtzlicher Dolmetscher, Gert kaj Uta Hoyer. Leipzig: Johann Ambrosius Barth, 1977. 262p. 21cm. Fleksebla plasta kovrilo. 271 frazoj utilaj por kuracisto antaŭ alilingva paciento, en lingvoj angla, franca, bulgara, pola, rumana, ĉeĥa, hungara, araba, Esperanta, itala, sveda kaj hispana. Prezo: 27,00 gld.

Biopolo; Centro por soci-ekologio, Ernst Bartels (1904?-1976). El la germana tradukis G.F. Makkink. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1977. 21p. Ilus. 21cm. Libreto Esp. n-ro 2. Prezo: 1,50 gld.

De oriento al okcidento; Internacia legolibro por la perfektigaj kursoj de Esperanto, Jože Kozlevčar. Zagreb: Slovenia Esperanto-Ligo kaj Kroatia Esperanta Junulara Asocio. 6 + 236p. Mimeo. 28cm. Pli ol 120 artikoloj, noveloj, poemoj, elĉerpajoj ktp. Kun biografiaj notoj pri aŭtoroj kaj tradukintoj. Prezo: 15,00 gld.



De paĝo al paĝo (1932), Lajos Tárkony (1902-). Budapest: Hungara Esperanto Asocio, 1976 (2a eldono, fotoreprese). 121p. 19cm. ISBN 963 571 001 1. Kritikaj studoj pri dek Esperantaj verkistoj de la intermilita periodo, kun ĝisdatigitaj bio- kaj biblio-grafiaj notoj. Prezo: 13,20 gld.

Dua manlibro de varbado, Günther Conrad. München: La aŭtoro, 1977. 70p. Ilus. 20cm. Provo apliki la reklamteknikon kaj la psiĥologion (precipe laŭ la teorioj de Jung) al Esperanto-varbado. Prezo: 8,10 gld.

Elektitaj siĝoj de Nosan, (ps. de Unsang Li, 1903 -). El la korea tradukis Taekeng Gim. Seŭlo: Nacia Kultura Asocio, 1976. 150p. 21cm. Bind. Cent "siĝoj" (kantoj el Oriento) pri la patrio, naturo kaj vivo, de elstara korea poeto, kies patriamon instigis siatempe la japana koloniismo. Kun noto pri formoj kaj traduk-problemoj de la siĝo. Prezo: 12,00 gld.

Enkonduko en la teorian biologion, B. Mészáros. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1976. 38p. 30cm. SUK-Kursotekstoj KT 24. Kun ĉapitro pri la ebleco de ekstertera vivo. Prezo: 9,30 gld.

Esperantal antologio en Idolinguo, tradukis kaj redaktis Tazio Carlevaro (1945-). Chiasso: Hans Dubois, 1977. 56p. Hekto. 30cm. Specimenoj de la poezio Esperanta, tradukitaj en Idon. Abunde prinotita. Prezo: 6,00 gld.

Espéranto et Interlingua; Brève étude comparative, Edo Bernasconi. El Esperanto tradukis Nicole Piron. La Chaux-de-Fonds: KCE, 1976. 28p. Mimeo. 21cm. Studoj 11. Franclingva traduko de studo pri la loko de Esperanto en la kompara interlingvistiko, aparte en rilato al la IALA-projekto Interlingua. Prezo: 4,80 gld.

Gudrun (1936), Johannes V. Jensen (1873-1950). El la dana tradukis Gudrun R. Jensen kaj H.E. Jensen. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 136p. 20cm. ISBN 87 85020 966. Amromano pri juna kopenhaganino. La aŭtoro ricevis Nobel-premion en 1944. Prezo: 10,50 gld.

Hiroi ŝijao cuĉikai kokusaitekina sukautoe, J.K. Hammer. Tradukis el Esperanto Akiko Woessink-Nagata. Skolta Esperanto-Ligo, 1977 (ne indikita). 32p. 14cm. Japanlingva konsilaro pri internacia skolta agado, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

Historio de Esperanto-movado en Koreujo (1906-1975), Sam-Su Kim. Sukmjong Virina Universitato, 1976. 473p. Ilus. 24cm. Bind. Plejparte korelingva. Prezo: 30,00 gld.

Interŝanĝo de riz-semoj, Li Defu. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 26p. Ilustris Ma Gianbin. 18cm. Bildrakonto pri helpo inter komunumoj. Prezo: 1,20 gld.

Jes, Esperanto estas vera lingvo! ; Respondo al Sprang Hanssen, István Szerdahelyi. La Chaux-de-Fonds: KCE, 1976. 42p. Mimeo. 21cm. Studoj 8. Lingvosciencia respondo al artikolo (1975) de la dana lingvisto H. Sprang-Hanssen, kiu neis la ĉi-titolan aserton. Prezo: 3,90 gld.

Kantoj poemoj kaj satiroj, Robert Burns (1759-1796). Trad. R. Rossetti (1909-) kaj W. Auld (1924-). Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1977. 79p. 21cm. Esperantaj Kajeroj 3. ISBN 0 9505323 1 2. La plej granda skota poeto trovas ĉe du siaj samlandanoj indan Esperantan interpreton. Prezo: 6,30 gld.

Kanto super lulilo; Ok slovakaĵoj aŭtoroj, redaktis O. Kníchal. Praha: MEM, 1976. 32p. Ilus. 20cm. Kelkaj eroj, prozaj kaj versaj, de la ĉi-jarcenta slovaka literaturo. Prezo: 1,20 gld.

Katalogo 1977/78; Libroservo de UEA. Rotterdam: UEA, 1977. 256p. Ilus. 16cm.

Kongresa Libro. Rejkjaviko: 62a Universala Kongreso de Esperanto, 1977. 128p. Ilus. 20cm. IX ISSN 0083-3851. Prezo: 10,00 gld.

Ni lernu plu; Kurso de Esperanto (dua grado), Violim Oljanov. Sofio: BEA, 1976. 138p. Mimeo. 22cm. Progresiga kurso kun bulgarlingvaj vortklarigoj. Prezo: 5,40 gld.

Nocioj pri ornitologio, W.M.A. De Smet. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1976. 83p. Ilus. 30cm. SUK-Kursotekstoj KT 23. Prezo: 17,40 gld.

Pluredroj kaj plurĉeloj, W.F. Orr. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1976. 31p. Ilus. 30cm. SUK-Kursotekstoj KT 22. Enkonduko al branĉo de la geometrio. Prezo: 8,40 gld.

Pri internacia lingvo dum jarcentoj (1970), kompilis Isaj Dratwer (1905-). Tel-Avivo: la aŭtoro, 1977 (2a pliampleksigita eldono). 16+320p. 22cm. Kolekto de citaĵoj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, filologoj, lingvistoj kaj aliaj. Prezo: 30,00 gld.

Vagado sub palmoj (1956), Jean Ribillard (1904-1962). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1977 (2a eld.). 52p. Ilus. 20cm. Aŭtobiografia felietonaĵo pri vivo en Saharo, verkita de unu el la plej rafinitaj Esperantaj stilistoj, kiu poste famiĝis per *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud*. Prezo: 6,00 gld.

Venis viro, Torben Nielsen (1918-). El la dana trad. Gudrun Riisberg. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 76p. 20cm. ISBN 87 85020 966. Kineca krimromaneto pri homo, kiu serĉas murdinton de sia filo. Prezo: 6,60 gld.

Zu neuen Horizonten durch internationale Pfadfinderarbeit, J.K. Hammer. Trad. el Esperanto Klaus Schubert. Skolta Esperanto-Ligo, 1977 (ne indikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**

TEJO-KOMITATO EN POITIERS:

Ĉefe pri Statuto

LA KOMITATO de TEJO, dum siaj kunsidoj en la kadro de la 33a Internacia Junulara Kongreso en Poitiers, akceptis aliĝojn al TEJO de du novaj landaj sekcioj. Temas pri la junularaj Esperanto-organizaĵoj en Finnlando kaj Kanado, kies akcepto altigas la nombron de la aliĝintaj landaj sekcioj al entute 30. Inter la aliaj decidoj de la Komitato estas menciinda ankaŭ la starigo de konstantaj komisionoj (eksteraj rilatoj, celoj kaj rimedoj, varbado, regiona agado). Tiuj komisionoj stimulos la aktivecon de la komitatanoj inter la komitataj kunsidoj, kiuj ja okazas nur unufoje jare — dum la kongresoj. Aliflanke, bona funkciado de la komisionoj malpezigos la laborŝarĝon al la Estraro de TEJO.

Grandan parton de sia atento en Poitiers la Komitato de TEJO dediĉis al la pristudo de nova statut-projekto de la junulara sekcio de UEA. Tiun projekton, kiun baldaŭ devus priekzameni la Komitato de UEA, ne karakterizas gravaj ŝanĝoj kompare kun la ĝis nun valida Statuto. Per la nova projekto oni celis interalie precizigi kelkajn — ĉefe administrajn kaj procedurajn

— demandojn de la rilatoj inter TEJO kaj UEA. Estas interese noti, ekzemple, la paragrafon pri celoj, kiu en la projekto tekstas jene: "TEJO realigas la celojn de UEA per adekvataj agadoj inter la junularo, okupiĝas pri la nuntempaj problemoj de la junularo, kun speciala konsidero de la internacia lingva komunikado, aplikante en sia laboro metodojn, kiuj respondas al la interesiĝoj de la moderna junularo. ..." La projekto precizigas la maksimuman aĝon de la membroj (ĝis 26 jaroj) kaj funkciuloj (ĝis 30 jaroj), notas la devojn de la landaj sekcioj rilate siajn asociajn membrojn en TEJO/UEA, plilongigas la mandaton de la Estraro de unu al du jaroj, kaj fiksas restarigon de la oficiala organo de TEJO, kio denove devus fariĝi ĉi tiu paĝo en nia revuo.

Iusence, tiuj statutaj preskriboj speguliĝis jam en la elektoj por la nova Estraro de TEJO (v. nian septembran n-ron, p. 159). El la dek estraranoj, nur tri plenumis tiun rolon antaŭe, kaj la meza aĝo estas konsiderinde malpli alta ol en pli fruaj jaroj. La dek estraranoj venas el naŭ diversaj landoj (du el Italio). Tamen iom strange impresas la fakto, ke — post plurjara virina "rego", — en la nova Estraro de TEJO estas nur unu virino. Cetere, la Estraro en Poitiers ekdiskutis sian laborplanon, baldaŭ poste pretigis ĝin kaj jam komencis agi laŭ tiu sia interna dokumento. S. MacGill

"Varbumo"

DUM LA 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Poitiers, "Varbumo" estis kvarhora serio de prelegoj, diskut- kaj labor-grupoj, por doni impulson al varbado por la junulara sekcio de UEA. 90 personoj partoprenis parton aŭ la tuton de la aranĝo, necesigante la starigon de kromaj diskutgrupoj. Pro la vicleco de la diskutado, la organizantoj kaj la nova estrarano pri varbado aperigis en la lasta tago de la IJK resumon de la protokoloj faritaj en la diversaj grupoj. Kvankam oni neeviteble iom repaŝis sur jam iritaj vojoj, leviĝis ankaŭ utilaj konkretaj proponoj:

- La starigo de konstanta komisiono pri varbado. La Komitato du tagojn poste tion faris.
- La eltrovo de ekzistanta Esperanto-oficejo, kiu povos servi kiel varbo-centro por TEJO, kaj deĵoranto por tiu centro. La nova estrarano pri varbado jam tion esploras kadre de sia propra laborplano.
- La kolekto kaj interŝanĝo de varbkonsilaj kaj aliaj materialoj, kaj pretigo de tiaj materialoj specife utiligeblaj por varbado inter gejunuloj.
- Pretigo de diapozitivserio pri la IJK, kaj pli intensa uzo de dramo, vidbendado kaj aliaj modernaj aŭdvidaj rimedoj en varbado.
- La starigo de TEJO-tago, krom tiu en la UK, en kiu landaj sekcioj kaj aliaj estos kuraĝigitaj aparte varbi por TEJO.

La resumo de la materialoj pri "Varbumo" estas havebla ĉe la koncerna estrarano: Amri Wandel, Hakalir-str. 15, IL-64245 Tel Aviv, Israelo.



Parto de la nova Estraro de TEJO pozas en Poitiers (supre, de maldekstre): S. Tsiturides, G. Van Tongerlo, S. MacGill, F. Gabalda, Cs. Lendvay (staras), B. Casini kaj T. Bormann (sidas).

Floroj por la ĝisnuna prezidanto: Claude Nourmont-Moon kaj Savas Tsiturides, eksa kaj nova prezidantoj de TEJO.



Venezuelo

• La 2an de aŭgusto, en la ĉefurba radiostacio de Venezuelo, Radio Capital, s-ro A. Martínez Alcalá, konata radio- kaj televid-komentisto, intervjuis tri funkciulojn de la landa Esperanto-movado: J. Mosonyi, F. García Blázquez kaj R. Ernesto Díaz. Temas pri tre populara, regula radio-programo por multnombra aŭskultantaro. Samtage, en alia programo, prof. J. Mosonyi donis alian intervjuon pri Esperanto al R. Ottolina, eminenta publika figuro de Venezuelo.

Rumanio

• Anstataŭ anoncita Esperanto-renkontiĝo en Braŝovo, tie la 28an de aŭgusto okazis simpozio pri la temo "Lingvo kaj kulturaj rilatoj". Kvankam ĉiuj ses prelegoj okazis en la rumana lingvo, inter kvindek da partoprenantoj ne troviĝis neesperantistoj. Estas interese noti, ke informoj pri Esperanto lastatempe multiĝas en la rumana gazetaro. Eĉ politikaj revuoj *Scînteia* kaj *Lumea* skribis pri Esperanto: la unua artikole notis la 90-jaran datrevenon de la Internacia Lingvo, la dua raportis pri la 62a UK en Islando.

Nederlando

• Post funda reordigo, unu el la du domoj, kiujn en Hago proprietas Internacia Esperanto-Instituto, feste remalfermiĝis por la publiko la 10an de septembro ĉi-jare. Ĉeestis plurdeko da gastoj, ankaŭ el la najbara Belgio. Pluraj ĉambroj en la "Esperanto-domo", kiel nun nomiĝas la konstruaĵo en Riouwstraat 172, portas la nomojn de eminentaj movadaj figuroj. Du el tiuj plenerituloj ankaŭ ĉeestis la solenaĵon: Teo Jung kaj — post multaj jaroj — Andreo Cseh, unu el la kunfondintoj de la Instituto.

• Trilanda renkontiĝo de belgaj, germanaj kaj nederlandaj esperantistoj okazos la 16an de oktobro en Heerlen. Informas: s-ro H. Peters, Nobelstr. 57, Heerlen, Nederlando.

Koreo

• Du sudkoreaj universitatoj jam dum pluraj jaroj regule okazigas Esperanto-kursojn en la intersemes-

tra feria periodo. Meze de julio ĉi-jare, tiaj kursoj okazis la dekan fojon en la Universitato Gugŝe kaj la 15an fojon en la Universitato Mjongsŝe. En la komenco al la kursoj aliĝis ĉ. 200 studentoj, sed finlurnis nur kelkdeko da entuziasmoj, kiuj fondis du rondojn kun nekutimaj nomoj "Sablero" kaj "Iru, iru".

Zairio

• Esperanto-Instituto de Zairio antaŭ nelonge ŝanĝis sian adreson, kiu nun tekstas: EIZ, p/a Nduantoni Bakidila Ngangu, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire).

Japanio

• Kun 534 aliĝintoj, la 64a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, okazinta en Tokio inter la 26a kaj 28a de aŭgusto, viciĝas inter la plej grandajn movadajn aranĝojn ĉi-jare. Novaĵo en la kongresa programo estis tuta aro da lingvaj kursoj, inkluzive de aparta aranĝo por estontaj kursgvidantoj. Pli frue, en junio ĉi-jare, kongreso de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj altiris 278 partoprenantojn. En ĝia kadro okazis oratora kaj deklama konkursoj.

• Komence de ĉi tiu jaro, en Osako fondiĝis pentrista Esperanto-grupo "Kamarado" (Fino H. Kawahito, Honmati 1-13-2, Toyonaka, Oosaka-hu, 560 Japanio). La kvinmembra grupo unuafoje ekspoziciis sukcese



en Osako, de la 27a de junio ĝis la 2a de julio. Estas interese noti, ke antaŭ iom pli ol dek jaroj en Osako alia pentrista grupo, "Reala Rondo", uzis Esperanton.

Belgio

• Bruĝa Grupo Esperantista, la plej malnova E-societo en Belgio, festos sian 75-jaran jubileon la 16an de oktobro 1977. La programo antaŭvidas akcepton en la urbodomo, bankedon ktp. (Ch. Poupeye, Fil. de Goedelaan 18, bus 11, B-8000 Brugge, Belgio).



• Hungario: Mezlerneja tendumado okazis en Szolnok-Tiszaliget en la kampaĵo de la hungara vojaĝoficejo "Expressz", inter la 19a kaj 25a de julio 1977. La aranĝo akceptis ankaŭ la lernantojn de la Budapeŝta TESCO-Kolegio (kie studas multaj ekstereŭropanoj) kaj grandnombre polajn gejunulojn; entute partoprenis 220 personoj. Dum la feriado, krom la distraj programoj, daŭris ankaŭ diversgradaj Esperanto-kursoj.

Sindikatoj

• En Britio, kie la informado pri Esperanto inter la parlamentanoj estas aparte vigla, komenciĝis ne malpli vigla agado en la sindikataj rondoj. Antaŭ kelkaj monatoj fondiĝis TUCEG (anglalingva mallongigo de Sindikata kaj Koopera Esperanto-Grupo), kiu por sia honora prezidanto varbis s-ron Jack Jones, kiu estas ĉefsekretario de la plej granda brita sindikata organizaĵo. Inter la apogantoj de la grupo troviĝas entute 12 gravaj sindikataj funkciuloj kaj 23 parlamentanoj. Sian anglalingvan faldfolion pri Esperanto TUCEG eldonis en 100 000 ekzempleroj kaj vaste distribuis inter la sindikatojn. La adreso de TUCEG estas: p/a D. Wetzel, 28 Penderel Road, Hounslow, Middx., Britio.

Konkursoj

• En la Anglalingva Traduka Konkurso (v. nian martan n-ron, p. 43), kiu okazis sub la aŭspicio de UEA, s-ro James F. Cool (Usono) gajnis la unuajn premiojn en la proza kaj poezia branĉoj; li dividis kun s-ro K. Long (Britio) ankaŭ la duan premion por poezio, dum la tria premio iris al s-ro Harry Holmes (Britio). La duan kaj trian premiojn en la proza branĉo gajnis skoto H. Martin.

Interlingvistiko

• Instituto por Kibernetika Pedagogio (Postfach 1567, D-4790 Paderborn, FR Germanio) ankaŭ ĉi-jare organizas interlingvistikan kunvenon. Temas pri la 2a Interlingvistika Laborkonferenco, kiu okazos en Paderborn inter la 24a kaj 27a de novembro. Pluraj prelegintoj en la pasintjara aranĝo (v. nian januaron n-ron, p. 8) revenos ankaŭ ĉi-jare: profesoroj I. Lapenna kaj I. Szerdahelyi, d-rino M. Šaturová, s-ro C. Gacond, sed oni atendas ankaŭ novajn prelegantojn: d-rojn H.M. Maitzen kaj D. Silagi, kaj prof. O. Reiersøl.

Periodaĵoj

• Lingvo, borso, joko – jen temoj, kiujn traktas la artikoloj en la ĉi-jara kajero de *Sennacieca revuo*. Krome,

nekonata "Eseŝ" (kiu li/ŝi estas?) prezentas la humanajn mesaĝojn de la jugoslavia verkisto Meŝo Selimoviĉ, dum Marjorie Boulton, la bone konata verkistino, kun mirinda malkaŝemo rakontas pri sia kara Oksfordo.

Komerco

• Dum Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) plendadas, ke Japanio aĉetas de EEK malmulton, la Banko de Tokio laŭte kritikis la Komunumon, ke ĝi faras malmultan penon por vendi. Laŭ la Banko, en la landoj de EEK troviĝas malmultaj homoj, kiuj lernas la japanan lingvon, dum en Japanio la kursoj de eŭropaj lingvoj furoras.



• Instruistoj: La 11a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazis inter la 14a kaj 24a de julio en Luksemburgo. Kiel konferencejo servis la moderna hotelo "Holiday Inn", kiu lastatempe reklamis siajn kapacitojn ankaŭ en la Internacia Lingvo. Kvankam al la Konferenco venis nur kelkdeko da instruistoj kaj gastoj, en Luksemburgo reprezentigis 13 landaj sekcioj de ILEI. La Konferenco unuanime akceptis la proponon de Unesko, ke ILEI fariĝu konsulta organizaĵo en la kategorio C.

Persone

Epstein

• S-ro Felix Epstein, honora membro de Germana Esperanto-Asocio kaj konata mecenato ankaŭ de la internacia Esperanto-movado, la 3an de septembro 1977 fariĝis 95-jara. Li lernis Esperanton en 1906 kaj kunorganizis jam la 4an Universalan Kongreson en Dreseno.

Maertens

• S-ro Grégoire Maertens, nova estrarano de UEA pri financoj, ĝuas pri tiu fako bonan reputacion ankaŭ ekster la Movado: Antaŭ kelka tem-

Kursoj

• Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estas planataj ankaŭ por aŭgusto 1978. En SUK-78, kiu okazos en Lieĝo (Belgio), oni planas i.a. lekciojn pri astronomio kaj kiel lekcianton antaŭvidas d-ron Hans M. Maitzen, iama prezidanto de TEJO, nun lektoro pri astronomio en la Universitato de Vieno.

• Fine de julio ĉi-jare, en Elsinoro (Danlando) okazis la 46an fojon Internaciaj FERIAJ Kursoj, sendube la plej prestiĝa tiaspeca aranĝo en la Movado. Ĉi-foje partoprenis 58 kursanoj el 14 landoj. Ankaŭ ĉi-jare la kursoj okazis sub la aŭspicio de UEA.

po s-ro Maertens fariĝis konsilanto en la kabineto de la financministro de Belgio.

Sekelj

• S-ro Tibor Sekelj, kiu jam dum pluraj jaroj mankas en la Movado, antaŭ kelkaj monatoj pensiigis kiel muzea direktoro. Tamen, post tio, li magistriĝis pri muzeologio en la Universitato de Zagreb (Jugoslavio). Li ja studis juron, estis etnologo, famiĝis kiel esploristo kaj vojaĝisto, aŭtoris dekon da libroj kaj pioniris pri Esperanto en du kontinentoj.

CLEMENTE ESTABLE

En Montevideo (Urugvajo), la 27an de aprilo forpasis prof. d-ro Clemente Estable (1895-1977). Li estis granda amiko kaj apoganto de la Internacia Lingvo. Dum la 7a Ĝenerala Konferenco de Unesko, en 1954, kiel urugvaja delegito, prof. Estable ludis gravan rolon en la pritrakto de la fama rezolucio pri Esperanto; li estis la unua kiu konfirmis sian apogon al Esperanto, post la subfosaj agoj de la dana prof. Blinkenberg (v. *Esperanto en Perspektivo*, p. 770).

NORMAN BOOTH

Kun granda prokrasto ni informiĝis, ke la 30an de junio pasintjare, en Bridlington (Britio), mortis Norman Booth (1894-1976). Li lernis la Internacian Lingvon en 1912 kaj aktivis ĉefe en Skolta Esperanto-Ligo, dum multaj jaroj kiel ĝia sekretario, poste vicprezidanto kaj honora prezidanto. Li estis fervora propagandisto de Esperanto kaj verkis multajn naci-lingvaj kaj Esperantajn artikolojn, kunorganizis siatempe Britan Kongreson de Esperanto en Bridlington, longtempe plenumis la taskojn de delegito kaj fakdelegito de UEA.

HERMANN WEHRHEIM

La 4an de majo, en Hildesheim (FR Germanio), forpasis d-ro Hermann Wehrheim (1885-1977). Li estis membro de UEA seninterrompe dum la lastaj 30 jaroj.

HENRY LUNDIN

Vicdelegito de UEA en Örebro (Svedio), inĝ. Henry Lundin (1902-1977) forpasis la 24an de junio. Li aktivis dum multaj jaroj, precipe en la kristana Esperanto-movado (KELI).

ENJO DASKALOV

En Vraca (Bulgario), komence de ĉi tiu jaro, forpasis Enjo Daskalov (1935-1977), tre aktiva instruisto de Esperanto, estrarano de Bulgara Esperantista Asocio kaj la ĉefa organizinto de la 19a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Vraca, en la jaro 1963.

STJEPAN ĆAKLEC

En Nova Gradiška (Jugoslavio), la 4an de junio forpasis Stjepan Ćaklec (1901-1977), malnova Esperanta aktivulo, kiu inter la du mondmilitoj spertis persekutojn pro Esperanto.

TIBOR UJLAKY-NAGY

La 6an de junio ĉi-jare, en Budapeŝto mortis Tibor Ujlaky-Nagy (1915-1977). Li lernis Esperanton jam kiel 17-jara junulo kaj precipe post la Dua Mondmilito viciĝis inter la plej aktivajn hungarajn esperantistojn. Dekomence li estis redakciano de *Hungara vivo*, kie aperis multaj liaj artikoloj kaj tradukoj. Ekde 1970 Ujlaky-Nagy dediĉis multan tempon al terminologia laboro. En 1972 aperis lia 300-paĝa proveldono de *La sporta lingvo en Esperanto*, kun tekstoj pri trideko da sportaj branĉoj. Li kunlaboris ankaŭ en *Slipara vortaro* de R. Eichholz. Ankoraŭ en aprilo ĉi-jare (v. nian revuon de tiu monato, p. 62) li varbis kunlaborantojn por sia granda projekto de sep-lingva sporta terminaro kun difinoj en Esperanto.

Oficiala Informilo

N-ro 509

Varbkampanjo kun premioj

PER FINANCAJ RIMEDOJ disponigitaj de la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) UEA aranĝas varbkampanjon por novaj individuaj membroj kun premioj. Temas pri eksterordinara konkurso, ĉar ĉiu, kiu sukcesas en la varbado, akiros premion. La reguloj estas jenaj:

- 1. Periodo.** La varbkampanjo daŭros ekde nun ĝis la fino de aprilo 1978.
- 2. Kvalifiko.** En la kampanjo povas partopreni ĉiu individua membro de UEA, sen konsidero pri la kategorio al kiu li/ŝi apartenas. Ne partoprenas ĉefdelegitoj kaj kotizperantoj.
- 3. Premio.** La premio konsistas el 100 folioj da leterpapero kun 100 kovertoj, sur kiuj estas presitaj la nomo kaj adreso de la premiito.

4. Varbito(j). La menciitan premion oni akiras pro varbo por la jaro 1978 de:

- unu nova individua membro de UEA kun abono de la revuo *Esperanto* (MA); aŭ
- du novaj individuaj membroj, sen abono de la revuo; aŭ
- du novaj abonoj de *Esperanto*, sen membreco.

La vorto "nova" ĉi tie signifas ĉiun, kiu ne estis membro, respektive abonanto, en la jaroj 1975, 1976 aŭ 1977. Se iu akiras pliajn varbitojn, la nombro de la leterfolioj kaj kovertoj fariĝos proporcie pli granda.

5. Kotizoj de varbitoj. La nomoj kaj kotizoj de la varbitaj individuaj membroj, respektive abonantoj, estu laŭ la kutima vojo (ĝenerale pere de la ĉefdelegito aŭ kotizperanto) transdonitaj al la Centra Oficejo de UEA (CO).

6. Komuniko al la CO. Por akiri la premion la varbinto devas komuniki al la CO:

- la nomo(j)n de la varbito(j) kun la adreso kaj la sciigo kian kotizon li/ŝi/ili pagis, kaj
- la deziratan tekston (nomo, adreso, telefonnumero) presotan sur la leterpaperoj kaj kovertoj.

Vi povas helpi la laboron de la CO de UEA pagante por 1978 frue vian kotizon

SOCIETO ZAMENHOF 1977

US: 216 E. Mary Meyers. FRANC: 217 Jack André Rousseau. FRG: 218 Bruno Vogelmann. US: 219 Cecilia Peterson; 220 Thos. A. Goldman. BRAZ: 221 Nydia Aydos Krieger; 222 Ivone Aydos Krieger; 223 J. Dias Pinto. NED: 224 A.W. van der Waal. FRANC: 225 Claude Bodson.

DONACOJ 1977 (Gld.)

ĝis la 31a de aŭgusto

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: H. Veenstra 1 200,00. Sumo ĝisnuna: 7 181,62.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 6,16. FR Germanio: H. Schindler 11,75. Nederlando: R. Moerbeek 50,00; H.C. Timmer 5,00. Sumo ĝisnuna: 1355,70.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Svedio: Memore al L. Sinha 575,75 (H. Karlson 14,00; O. Olsson 14,00; H.J. Örtenblad 28,00; G. Nilsson Hjorth 150,75; Sundsvalle Esperantoförening 50,25). Sumo ĝisnuna: 1537,53.

ĜENERALA KASO: Belgio: C. Vanbiervliet 300,00. Brazilo: V.M. da Silva 17,50. Britio: H.P. Saunders 4,14. Finnlando: Finnlandano 209,05. FR Germanio: E. Ackermann 10,60; H. Weiershauser 5,24; M. Klünder 100,00. Kolombio: Antiokia E-Ligo 24,80. Nederlando: W.F.J. Fortuin 10,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; M. Meywes 200,00. Svedio: I. Söderman 27,69. Usono: T. Frank 2,45. Sumo ĝisnuna: 4 471,68.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1977: 19 A. Orsolini, Belgio. 20 P. Zlatnar, Jugoslavio.

UNESKO-KAMPANJO: Aŭstralio: R. Harry 48,64. Belgio: A. Fighiera-Sikorska 25,00; R. de Kegel 121,60. Britio: D. Hill 50,00. Danlando: P. Bagger 39,25. Francio: R. Brinon 35,05; J. Guillaume 50,00. Irano: J. Sadighi-Saheb-Zamani 244,10; M. Saghafian 182,40. Italio: C. Conterno 243,20. Japanio: S. Yamazoe 53,50; S. Kawamura 187,50. Nederlando: I.M.J. Dijkhoff-Lenze 150,00; H.C. Timmer 25,00; G.H.B. Bos-Wolf 25,00; E.J. Woessink 258,04; G.F. Makkink 250,00. Portugalio: F. Costa 105,98. Svedio: I. Eriksson 54,00; A. Nilsson 137,50; L. Holmlund 62,50; T. Farm 60,80. Usono: H. Tonkin 250,00; ges-roj Mudry 242,44; Ĝ. Harabagiu 13,11. Anonimaj 169,32 kaj 24,32. Sumo ĝisnuna: 3 108,25.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Kotiztabelo por 1978

La kotizaltiĝo je 10%, kiun vi konstatas en la ĉi-suba tabelo, ne okazas por kovri la kreskantajn kostojn, sed por ebligi, ke ekde januaro 1978 ĉiuj ekstereŭropaj abonantoj ricevadu la revuon *aerpoŝte*, sen aldona pago. Cetere, la altiĝo je 10% estas la plej malgranda kotizkresko en la lastaj 30 jaroj!

Lando	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ	Valuto
Argentino	2800	7000	4200	2100	14000	arg. peso
Aŭstralio	8,40	21,00	12,60	6,30	42,00	aŭs. dolaro
Aŭstrio	160	400	240	120	800	ŝilingo
Belgio	320	800	480	240	1600	belga franko
Brazilo	90	225	135	70	450	kruzejro
Britio	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00	brita pundo
Bulgario	10,40	26,00	15,60	7,80	52,00	levo
Ĉeĥoslovakio	130	325	195	100	650	ĉeĥ. krono
Danlando	58,00	145,00	87,00	43,50	290,00	dana krono
Finnlando	40	100	60	30	200	finna marko
Francio	44	110	66	33	220	fr. franko
FR Germanio	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00	germ. marko
Greklando	240	600	360	180	1200	draĥmo
Hispanio	720	1800	1080	540	3600	peseto
Hungario	160	400	240	120	800	forinto
Irlando	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00	irl. pundo
Islando	1800	4500	2700	1350	9000	isl. krono
Israelo	66	165	100	50	330	isr. pundo
Italio	8000	20000	12000	6000	40000	itala liro
Japanio	2520	6300	3780	1890	12600	eno
Jugoslavio	132	330	200	100	660	dinaro
Kanado	10,00	25,00	15,00	7,50	50,00	kan. dolaro
Kolombio	304	760	456	228	1520	kol. peso
Korea Resp.	3080	7700	4620	2310	15400	ŭono
Luksemburgo	320	800	480	240	1600	luks. franko
Meksikio	110	275	165	85	550	meks. peso
Nederlando	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00	guldeno
Norvegio	52,00	130,00	78,00	39,00	260,00	norv. krono
Nov-Zelando	8,40	21,00	12,60	6,30	42,00	novz. dolaro
Peruo	400	1000	600	300	2000	solo
Portugalio	320	800	480	240	1600	eskudo
Sud-Afriko	8,00	20,00	12,00	6,00	40,00	rando
Svedio	46,00	115,00	69,00	34,50	230,00	sved. krono
Svislando	23,00	58,00	35,00	17,50	116,00	svis. franko
Urugvajo	14,00	35,00	21,00	10,50	70,00	urug. peso
Usono	9,20	23,00	13,80	6,90	46,00	us. dolaro
Venezuelo	34,00	85,00	51,00	25,50	170,00	bolivaro
Aliaj landoj	30	73	44	22	146	int. resp. kup.

MJ = Individua Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis ink. 25 jaroj, *Kontakto*)

MA = Individua Membro-Abonanto kun Jarlibro kaj *Esperanto* (kaj, ĝis ink. 25 jaroj, *Kontakto*)

SA = Simpla Abono de *Esperanto*, sen membreco de UEA/TEJO

Kto = Abono de *Kontakto*, sen membreco de TEJO

SZ = Aldona sumo por membreco de Societo Zamenhof

DM: Dumviva membreco kostas 25 x MA (1375,00 gld.)

LPLP: Abono de unu volumo (3 numeroj) de *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* kostas same, kiel SA (33,00 gld.)

PT: Patrona membro de TEJO pagas duoble la kotizon de *Kontakto* (33,00 gld.)

"*Esperanto-dokumentoj*": 10 numeroj kostas duonon de MA (27,50 gld.)

"*UN kaj Ni*": 10 numeroj de tiu bulteno kostas kiel MJ (22,00 gld.)

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

DEMANDO 13

(la respondo aperos en nia
novembra numero)

Tiu ĉi demando konsistas el kvin vort-portretoj de virinoj. Ili ne estas esperantistinoj, sed ili estas bone konataj al legemuloj en Esperanto. Ĉiu ĉefrolas en mondfama beletra verko tradukita en Esperanton. Ĉu vi povas identigi ilin surbaze de la priskriboj en la sekvaj citaĵoj?

1. "La knabino je la unua rigardo ne faris je Petronius grandan impreson. Ŝi ŝajnis al li tro maldika. Sed de la momento, kiam li rigardis ŝin pli proksime en la **triclinium**, li ekpensis, ke tamen tiel povas aspekti Aŭroro — kaj, kiel spertulo, li ekkomprenis, ke estas en ŝi io eksterordinara. Ĉion li rimarkis kaj ĉion li taksis: la vizaĝon rozkoloran kaj klaran, kaj la freŝan buŝon, kvazaŭ pretan al kiso, kaj la okulojn, bluajn kiel mara lazuro, kaj la alabastran blankecon de la frunto, kaj la abundon de la malhelaj haroj, trabilantaj sur bukloj la koloron de sukceso aŭ de korinta kupro — kaj la facilan kolon, kaj la 'dian' deklivecon de la ŝultroj, kaj la tutan figuron flekseman, gracian, junan per la juneco de majo kaj de ĵus-ekflorintaj floroj. Vekiĝis en li artisto kaj adoranto de belo, kiu eksentis, ke sub statuo de tiu ĉi knabino oni povus subskribi 'printempo'."

2. "La sekvantan tagon, iom antaŭ la reveno de la ĉasistoj, kiam fraŭlino Lydia, post promenado sur la marbordo, reiris al la gastejo kun sia ĉambristino, ŝi rimarkis nigrevestitan junan virinon, rajdantan sur malgranda sed vigla ĉevaleto, kiu eniris la urbon. Post ŝi sekvis, sur alia ĉevalo, kamparano kun jako el bruna drapo, truita ĉe la kubuto, kun ledobotelo ŝultrozono, kaj pistolo en sia zono; en sia mano li tenis pafilon, kies kolbo kuŝis en ledopoŝo firmligita al la selligno; mallongvorte, li estis kostumita tute

kiel melodrama bandito, aŭ korsika burĝulo dumvojaĝe. La rimarkinda beleco de la virino altiris la atenton de fraŭlino Lydia. Ŝi aspektis proksimume dudekjara. Ŝi estis granda, blanka, kun malhelbluaj okuloj, roza buŝo, emajlaj dentoj. En ŝia mieno estis legeblaj kune fiereco, maltrankvilo, malĝojo. Surkape ŝi portis tiun vualon el nigra silko nomata **mezzaro**, kiun la Genovanoj enkondukis en Korsikon, kaj kiu tiel bone konvenas virinojn. Longaj plektaĵoj de kaŝtankoloraj haroj kuŝis kvazaŭ turbano ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝia kostumo estis pura sed plej simpla."

3. "Eksciinte, ke la sinjoro vokas ŝin, F— forte ektimis, ŝi iris tamen kun la patrino. Nikolao Petroviĉ kondukis ŝin al la fenestro kaj prenis ŝian kapon per ambaŭ manoj. Esplorente bone ŝian okulon, ruĝan de la inflamo, li ordonis fari kompresojn, tuj mem preparis la medikamenton, kaj disŝirinte en pecojn sian naztukon, montris, kiel oni devas meti ilin. F— atente aŭskultis lin kaj kiam li finis, ŝi volis foriri. 'Kisu la manon de la sinjoro, malsaĝa infano! — diris al ŝi Arina. Nikolao Petroviĉ ne donis al ŝi la manon, kaj konfuzita mem kisis ŝian klinitan kapon je la hardisigo. La okulo de F— baldaŭ resaniĝis, sed la impresoj, farita de ŝi je Nikolao Petroviĉ, malaperis ne baldaŭ. Li senĉese vidis spirite ĉi tiun puran, delikatan, time levitan vizaĝon; li sentis sub siaj manoj ŝiajn molajn harojn, vidis ŝiajn senpekajn lipojn malfermetitajn, de post kiuj brilis en la radioj de l'suno ŝiaj malsekaj, perlaĵ dentoj. Li komencis tre atente rigardi ŝin en la preĝejo, penis plej ofte ekparoli kun ŝi."

4. "Tia, kia [li] nun vidis ŝin, veturante hejmen de karbo-transportado en la arbaroj, kun fulgaj manoj kaj argila pipo en la buŝo, vestita per mallonga, sensubŝtofa ŝafpelto kaj strikolora, hejmteksita lanjupo, kun krudaj ŝuoj sur la piedoj kaj tranĉilingo ĉe la brusto, kun grizaj haroj, starantaj supren super maljuna, bela vizaĝo, tia ŝi milfoje aperis al li en la priskriboj . . . Severa kaj taŭga sinjorino ŝi estas . . . Ŝi portas unu kaj duonan hektolitron da sekalo sur siaj larĝaj ŝultroj. Ŝi akompanas la ferŝtonan transporton de la mineja regiono sur la longa vojo al Ekeby. Kiel transportisto ŝi dormas sur fojneja planko kun sako sub la kapo. En la vintro ŝi povas gardi

karbigstakon, en la somero akompani flostrunkaron suden sur Löven. Aplomba sinjorino ŝi estas. Ŝi blasfemas kiel stratknabo kaj kiel reĝo regas siajn sep uzinojn kaj la bienojn de la najbaroj, regas sian propran paroĥon kaj la najbarajn, jes, la tutan belan Vermlandon."



La aŭtoro
(Demando 4)



La tradukinto
(Demando 4)

5. "Sur la perono staris juna virino en funebra vesto kun tre pala vizaĝo. Egale pala kaj ankaŭ funebre vestita kvarjara knabineto alkroĉiĝis al ŝiaj manoj, kiuj, kvankam ne perdinte sian forton, pendis tamen velke, donante al la figuro de la virino la eksteraĵon de granda malĝojo kaj sufero. . . . Sed la juna patrino ne dormis; en sia funebra vesto, kun disliberigitaj nigraj bukloj, kun vizaĝo apogita sur la manplato, ŝi sidis senmove kontraŭ la estingiĝanta fajrejo kaj meditis. Komence mordanta doloro faldis ŝian blankan frunton en kelke da profundaj sulkoj, la okuloj pleniĝis de larmoj, la brusto leviĝadis per malfacilaj ĝemoj. Sed post iom da tempo ŝi ekskuis la kapon, kvazaŭ ŝi volus forpeli la amason da kordoloroj kaj timoj, kiuj ŝin sieĝis, rektigis la talion kaj diris mallaŭte: 'Nova vivo!'. . . Ĉu tiu juna, bela virino kun la gracia talio, la blankaj manoj kaj silkecaj nigraj haroj, dense ĉirkaŭantaj la belforman kapon, posedis ian forton de akirado? Ĉu el sia estinteco ŝi elportis ion, el kio ŝi povus krei estontecon? Ŝi meditis pri tio, sidante sur malalta ligna seĝeto antaŭ la ardantaj karboj de la kameno. Ŝiaj okuloj kun esprimo de profunda amo estis fiksitaj sur la vizaĝeto de la infano, kiu trankvile dormis sur la blankaj kusenoj."

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Se vi ŝatus gastigi eksterlandajn esperantistojn, registriĝu por 1978 en la Pasporta Servo de TEJO. Petu tuj pri la kondiĉoj kaj avantaĝoj de registriĝo de: J. M. Cash, 9 rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Limdato por definitiva enskribiĝo: 1-a de decembro 1977.

Por ricevi senpagan specimen-ekzempleron de la *Internacia Kvitanc-libreto*, sendu 3 irpk-jn al Mondkomerca Eldonejo Esperantista (RE), Poŝtokesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam.

IBRA RADIO, Esperanta programo, ŝanĝis sian korespondadreson. La nova adreso estas: Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.

PRIVILEGIA VOJO: Se vi ricevis ekzempleron, kie la paĝoj 124 kaj 128 estas egalaj, petu korektofolion, kun la ĝusta teksto por p.124 de via librovendejo aŭ de Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, SF-02230 Espoo 23, Finnlando.

1977 — Spinoza jaro. Albert Goodheir, *Fondita sur roko*. La filozofio de Spinoza post tri jarcentoj. KARD0, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. £1.35.

Monerojn kaj neuzitajn argentinajn poŝtmarkojn memorigajn sendas Luis Vicino, Maza 1450, 1240 Buenos Aires, Argentino; interŝanĝe deziras maksimumajn kartojn rilate al pentroarto.

INSIGNOKOLEKTANTOJ! La Libroservo de UEA havas en la stoko kelkcenton da metalaj kaj plastaj insignoj de la 51a, 52a, 53a, 55a, 56a, 57a kaj 58a Universalaj Kongresoj. Serio de kvin diversaj insignoj kostas nur 3,75 (por Nederlando 4,43) gld. Ĉe aĉeto de minimume tri serioj, oni ĝuas rabaton de 33%.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.


Koran dankon, gesamideanoj, pro viaj bondeziroj direktataj al Petro van Bentum, nun flegata en "Preva"-Domo, Mgr. Nolenslaan 20, Den Haag, Nederlando. Marjo van Bentum.

100-persona grupo de mezlernejanoj el la naskiĝloko de Zamenhof volas korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo. Esperanto-Klubo Z.H.P., ul. Marchlewskiego 3/1, PL-15-042 Białystok, Pollando.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Studento pri konstrutekniko, 24-jara, deziras korespondi tutmonde: s-ro Kryszt0f Mikulski, ul. Obr. Westerplatte 16/3, PL-80-317 Gdańsk-Oliwa, Pollando.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, petu de la CO de UEA cirkuleron kun utilaj informoj.



ABZ de amo estas havinda popularscienca verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la sekso vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledumita plasto.
Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj.

Mendu ĉe: UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Se ĉiuj, kiuj tion volas, povus pagi sian kotizon, UEA HAVUS DUOBLE PLI DA MEMBROJ!

Fondaĵo Canuto estas praktikado de solidareco kaj amikeco

Eble ankaŭ vi povas helpi al unu el tiuj esperantistoj, kiuj ne havas eblecon sendi la membrokotizon pro transpagaj malfacilaĵoj!? Pagante vian propran kotizon, sendu donacon de unu membrokotizo al FONDAĴO CANUTO de UEA. Vi povas indiki la nomon de persono, kiun vi volas membrigi, aŭ lasi la elekton al la Centra Oficejo de UEA.

KORAN ANTAŬDANKON nome de nova membro de UEA pere de FONDAĴO CANUTO!

KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo

ANKORAŬ HAVEBLAS
la jam (fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Se vi ne aĉetos ekzemplaron de la dua eldono, vi devos poste atendi la trian.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) guldenoj.



fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.



KONTAKTO
revuo por ĉiu sezono

KONTAKTO
pri temoj plej diversaj

KONTAKTO
la bela revuo de TEJO

kontakto




Perspektivoj por
junulara movado

PERFEKTAJ DONACAĴOJ!

ĈINOMOJ

Individuaj pendornamaĵoj / ŝlosilar-langetoj



Ekzemplo:
Ludovik Zamenhof

Dorsa
flanko

Indiku la deziratajn nomojn nacilingvaj. Ni ĉinigos ilin, kaj sendos al vi kun ĉiu ĈINOMO klarigan tekston en Esperanta kaj angla lingvoj, ledan bendon (por eventuala ĉirkaŭkola uzo) kaj ŝlosilringon. Po 2,00 britaj pundoj (aŭ 15 internaciaj respondkuponoj), inkl. de afranko. Dua kaj postaj ĈINOMOJ (samtempa mendo) po 1,50 britaj pundoj.

Mendu ĉe: S-ino E. Rowe (Fako ES), 69 Longley Lane, Huddersfield, Anglujo HD4 6PR.



Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.